

Bô Yin Râ

LETEROJ  
AL UNU KAJ MULTAJ

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG  
BERN

El la Germana originalo  
(„Briefe an einen und viele“, eldono de 1971)  
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

## Antaŭparolo

En mia libro titolita „Vojomontriloj“ mi sufiĉe klare diris, ke, kaj kial, mi estas kontraŭ la publikado de leteroj de mortintoj, kiuj rilatas al *difinitaj okazoj*, do havu nur *unufojan* validecon, kaj tial povas esti taksataj nur post plej ekzakta ekkonado de la cirkonstancoj de ilia estiĝo.

Sed ĉar mankas al mi ĉiu potenco por preventi, post mia „morto“, publikadon de leteroj, kiujn ankaŭ mi skribis nur rilate al *momentecaj*, specifdataj okazoj kaj kiujn mi rigardis kiel nur *unufoje* validajn en *ilia* propra sfero, estus sufiĉe malsaĝe, se mi jam dumvive afliktiĝus pri tiu *eventuala* misuzo de io mia.

Sed mi trovas min motivita, igi la leganton *senerare* ekkoni tion ĉiam nur *efemeran*, unutagan de okazaj leteroj *kondiĉitaj de tempo kaj temo*, per tio, ke mi tie ĉi prezentas – *kiel kontraŭekzemplon* – leterojn, kiuj *ĉiutempe* denove povas alporti helpon al unuopuloj, ĉar ili konigas vere nur mian instruon rilatantan al ĉiuj tempoj.

Mi iam skribis tiajn leterojn *multfoje* al *multaj*, kvankam ĉiufoje en modifita formo, tiel ke ekzistos multaj legantoj, kiuj rekonos *sin mem* en la figuro de l' adresato. Sed mi esperas, ke neniu el tiuj ĉi tie celitaj nun sentos tion iam al *li private* prezentitan eble „profanita“ per la publikado de tio mia (publikado por kiu mi *sola* havas la rajton), ĉar

ankaŭ nun tio dirita povos servi nur al tiuj animoj, kiuj estas *en si mem preparitaj* por tio.

Tio, kion mi havis por respondi en ĉiu unuopa okazo al la leteroj kaj demandoj de *multaj diversaj* homoj, estas nun tie ĉi kunigita, ĉar mi *ĉiufoje* interrilatis kun *animo* katenita en la tera sfero, kun ĝia tie ĉi ebla spertado kaj kun ĝiaj *ĉiam samaj* „demandoj“. Ĉiu unuopa letero tie ĉi prezentita rilatas fidele al specifaj demandoj, sciigoj kaj raportoj iam atingintaj min. La *okazo*, kiun mencias la respondo donita en mia libro, do *neniam* estis tiucele *elpensata* de mi. Sed jam longe estas pasinta la tempo, en kiu mi – krom la rigora devoplenumado, konata nur al mi, *en la eterna spirito*, de mateno ĝis noktiĝo – povis produktive labori praktike senpaŭze, tiam rapide prenis malgrandan manĝon, kaj poste ĝis la matena krepusko sidis ĉe la skribtablo *por respondi leterojn*; tiam, post mallonga profunda dormo, mi ree staris antaŭ pentrotabulo aŭ donis al manuskriptoj la formon, en kiu ili fariĝu alireblaj al la homoj esperantaj lumon. Hodiaŭ mi ne volas demandi, ĉu mia memdonemo estis tro nelimigita rilate *la respondadon al leteroj*, sed mia terkorpa organismo reagis tre malbone al la traktado kiun ĝi devis suferi seninterrompe *dum multaj jaroj*, tiel ke mi estis *devigata* definitive rezigni ĝin.

La tie ĉi donitaj leteroj estu nun prezentitaj al *ĉiuj* homoj indaj je la instruo, kiuj *solaj* rigardu sin *alparolitaj* per ili.

Ke mi povis multe *pliriĉigi* ilian enhavon, kompare kun la antaŭe tiom ofte skribitaj *privataj* eksplikaj kaj konsilaj leteroj, rezultis el la tasko, donita al mi de mi mem, tie ĉi

doni *libron* en la formo de leteroj: – libron, kiu, jam ekde antaŭ longe preparita, povis ricevi finfine nur tiun ĉi formon.

La leteroj estis ne *diktataj*, sed – malgraŭ ĉiuj fizikaj malhelpaĵoj nun ĝenantaj mian skribadon – *mane skribataj*, same kiel mi antaŭe, *sen* penigaj malhelpoj, povis skribi *iliajn modelojn*. Sed tie ĉi ne temas pri „escepto“, ĉar ĝis la hodiaŭa tago mi publikigis *nenion*, kio estiĝis *aliamaniere* ol *manskribe per plumo*. La manuskripto por la kompostisto ĉiam rezultas el *manskribita* unua manuskripto, kiu pleje ne povas kaŝi la fizikan penon necesan por ĝia estigo kaj tiom malmulte respondas al la postuloj metataj de mi al mia manskribo, ke la raraj, nepre necesaj leteroj, kiujn mi kelkfoje ankoraŭ provas skribi, devas esti diktataj al stenografanta persono por posta tajpado. Sed hodiaŭ la *manskribado*, kiom ĝi estas al mi ebla, devas resti rezervita sole al la *formado* de miaj *instruaj tekstoj*, kiuj nun prezentiĝas en tiu ĉi libro en *letera formo*; kaj ĉiu leganto celita kaj reale alparolita de mi rajtas rigardi ĉiun leteron kiel direktitan *al si mem*, kvankam mi neniam ricevis leteron de li kaj ankaŭ certe ne povus private respondi tian leteron.

*For!* – *Foriĝu* vi,  
Kiuj ĉirkaŭas intence  
Kaj asidue ĉion,  
Kio ne estas destinita  
Por la voluptema avido  
De viaj terkorpaj *animoj*  
*Animalaj*, malpure odorantaj!

Mi ne estas veninta,  
Por ke vi: – la solaj,  
Kiujn mi *ne* vokas –  
Nomu min „la via“!

Kion mi alportas,  
Tio estas prezentita  
Nur al tiuj homoj puraj,  
Atendantaj la *eternan* animon,  
Acerbe memretenemaj,  
Longe hezitantaj,  
Kiu scias preni per *purigitaj* manoj  
Tion, kion vi nur – *makulas!*

\*

„Diru al ni: – *Kiu vi estas?*  
Ni devas *koni* vin! –  
Kiel ni vere kaj trafe  
Nomu *vian specon?*!“

*Mi estas radio*  
*Kaj ties eterna lumo!*  
*Mi estas vorto*  
*Kiu parolas sin mem!*  
Mi estas glavo  
Kaj ŝirmanta ŝildo!  
Mi estas formanto  
Kaj lia bildo!  
Mi estas ringo

Kaj ĝia ŝtono!  
Mi estas la vinfaristo  
Kaj estas la vino!  
Mi estas trunko  
Kaj ĝia ŝoso!  
*Mi estas homo,*  
*Kiu scias la manieron:*  
*Bati fajrerojn*  
*El eterna glacio!*

\*

Kion mi venas por alporti,  
Tion oni alportas unue  
Al la *propra* sango,  
*Antaŭ* ol oni pludonas,  
El sia *propra*ĵo,  
Ankaŭ al *fremdaj* triboj  
Tion, kion ili valide akceptas. –

Se vi ne volas havi tion,  
kion mi prezentis  
*unue* al vi,  
Tiam vi pli malfrue  
– kredu al mi:  
mi konas la ordonon –  
iros por alporti *de malproksime*  
tion, kion *vi* hodiaŭ *povis* trovi, – –  
Kiel kunuloj de la *nokto*,  
timeme, sur senbrujaj plandoj ...

\*

## LA LETEROJ

### Unua letero

Vi diras al mi, ke vi en la „Libro pri la vivanta Dio“ trovas multon, kiun vi jam de longe rigardas kiel proprajon de via animo, kvankam vi ne kapablis doni „esprimon en vortoj“ al tio anime sentita de vi.

Ĉar vi ne detale mencias specifajn lokojn en la libro, al kiuj rilatas via rekono de propraj sentoj, mi supozas, ke legante en la diversaj ĉapitroj, kiuj laŭ enhavo kaj formo sendube estis novaj por vi, vi tamen kelkfoje renkontis frazojn, kiuj tuŝis vin kiel vortaj prezentaĵoj de tio sentita de vi jam *sen* mia libro.

Se tiu mia supozo estas ĝusta, tiam temas vere pri „rekono“ de tio via propraĵo, ĉar via animo originas el la sama pra-fundo kiel mia animo, kaj mi en miaj libroj strebas al nenio alia ol al la prezentado de la eterna *realo* tute netuŝita de ĉia tempa opiniado kaj kredado, realo, kiu estas praposedado de *ĉiuj* animoj, eĉ se, en tiu ĉi surtera vivo laŭte supersonata de tio fizikkorpa, la konscio pri tiu posedado estas forŝovita, tiel ke ĝi restas nur songeca, malproksima bildo de paliĝinta rememoro.

Tiel rigardate, via aserto tute ne surprizas min. Ĝi montras al mi nur, ke kelkaj el miaj vortoj kapablis tiom

pliintensigi la bildecan rememoron de via animo, normale apenaŭ kapteblan dum la surtera vivo, ke ĝi en la koncernaj punktoj de l' teksto fariĝis vortforme kaptebla por vi.

Kion vi diras pri la feliĉo re-sperti, pere de miaj vortoj, ĉiutempe denove „laŭ deziro kaj volo“ animajn sentojn bone konatajn al vi, estas nur konfirmo de tio supre eksplikita, tiel ke vi povas esti tute senzorga rilate la al vi „strangan, sed tamen bonfaran“ senton de atingita certeco pri interna regiono, kiu antaŭe ŝajnis al vi tute neesplorable.

Sed vi estas bone konsilita de vi mem, se vi konfesas al mi, ke vi sentas, kiom multe vi ankoraŭ *bezonas* miajn vortojn, kaj ke vi ankoraŭ ekkonas en tiuj vortoj la solajn taŭgajn „*ŝlosilojn*“ por la trezorejoj de via anima posedaĵo.

Mi volonte plue aŭdos de vi, kiel vi scias uzi tiujn ŝlosilojn.

Vi certe ne povos atendi regulan leterinterŝanĝon kun mi. Mi devus povi multobligi min mem, se mi volus plenumi eĉ nur la plej malmultajn dezirojn, kiuj esperas respondon al leteroj adresitaj al mi. Ne mia „valora tempo“, kiun esprimon mi trovas ĝistede menciita en multaj leteroj, malpermesas al mi skribi ĉiujn respondojn, kiujn mi volus doni kun elkora volonteco, sed la tera *forto* disponebla al mi, kiu jam de longe estas troŝarĝita super ĉia permesebla mezuro.

Sed se mi rimarkus en viaj raportoj, tie ĉi eksplicite *de mi* petataj, ke vi subfalas al iu ĝena eraro, mi faros ĉion al mi eblan por doni al vi bonan konsilon.

La ĉielo benu vin!

## Dua letero

Nia kapablo sperti *ion animan* estas malhelpata de certaj baroj kontraŭ enpreno, kiujn oni povas nomi, analoge al la funkciado de niaj *fizikaj* kapabloj, „signoj de laciĝo“. Tio, kion vi nun havas por raporti al mi, estas klare ekkonebla kiel priskribo de tia signo de laciĝo.

En via unua ĝojo pri tio, ke vi ekvidis animan sentadon al vi konatan prezentita unuafoje en vortoj, vi evidente preteratentis ĉion alian en mia libro kaj ne okupiĝis pri tio ne konata al vi. Via ekscitiĝo rezultanta el tiuj miaj vortoj, kiujn vi sentis kiel „ekzakta priskribo“ de la anima spertado al vi konata, estis laŭ via diro „treege forta kaj persista“. Sed neniu homo povas daŭre firmteni tian animan ekscitecon en konstanta intenseco. Sekvas necese kaj neeviteble – kaj feliĉe por nia fizika organismo – la malfortiĝo eĉ de la plej intensa anima ekscitiĝo. Sed vi volis rezisti al tio kaj kredis, ke la ĉiam repetita legado de la frazoj, kiuj antaŭe estigis en vi la tiom vivan efikon, devas konduki al ĉiam nova feliĉigo per konfirmo de propra anima spertado. Ke el tio devis rezulti nur pli kaj pli

granda laciĝo, ne venis al vi en la kapon, kaj en tiu stato de superlaciĝo subite ekaperis antaŭ vi tiuj vortoj, kiuj temas pri aferoj ankoraŭ tute nekonataj al vi. Sed tio tute ne estas „iom horora“ aŭ „timiga“, kiel vi diras al mi en via letero.

Vi nur ekkonsciis pri tio, ke, dum via unua enprofundiĝo en priskriboj de tio al vi konata, estis *eskapinta* al vi tio ankoraŭ ne konata al vi, ĉar vi senvole ne atentis ĝin.

Sed io simila okazos al vi dum *ĉiu* nova legado en libro mia, eĉ se vi kredas, ke vi scias preskaŭ parkere la enhavon de la libro, kiun vi ĵus prenis en la manon. Je via surprizo vi rimarkos, ke vi ja *opiniis* vin scianta ĝian enhavon, sed dum relegado renkontas ree kaj ree *novan* enhavon!

Tiuj ĉi libroj ne povas esti „definitive finlegataj“, ĉar ilia enhavo donas prezenton al *ĉiuj entute eblaj* statoj de anima konsciiĝo, kaj ĉar dum *ĉiu* nova legado la leganto havas alian animan enprenkapablon.

Vi do havas nenian kaŭzon dubi pri la ebleco plivastigi kaj pliprofundigi vian kapablon de anima spertado. Sed vi devas esti pacienca, kiel oni devas havi paciencon, se oni volas lerni ludi muzikinstrumenton aŭ lerni libere kaj glate uzi fremdan lingvon.

Vi eble trotaksis vian konon de tio, kio estas spertebla al ni homoj en la animo, kaj nun vi devas klopodi por ekkoni, ke ekzistas nekompareble *pli* en la animo por spertado, ol vi ĝis nun povis suspekti.

Se la nunaj duboj pri via kapablo sperti ion animan estonte gardos vin kontraŭ tiom fatala *trotaksado* de tio, pri kio vi kredas, ke vi anime spertis ĝin, tiam via ĉi-momenta disreviĝo estas la plej bona antaŭsigno por tio, ke vi iam trovos vin vekiĝinta en la regno de la animo, eĉ se eble daŭrus pli longe ol vi dezirus. Kolektu novan kuraĝon kaj konsideru, ke por atingi vian celon vi bezonas grandan sindonemon!

Ĉar vi tro malproksimen  
vin de vi mem forigis  
Kaj songe per songa  
bildo vin ĝojigis,  
La ligo, kiu ligis vin  
Kun Dio, glitis for de vi:  
En trompo kaj vantaĵo  
vi je vi mem suferis.

*Premita* en vin mem,  
vi tiam vokis Dion, –  
*Premita* de vi mem,  
vi kuŝas nun antaŭ la ŝtupoj,  
Kiuĵ – *en vi mem* –  
*levas* vin al Dio:  
El nebulo kaj mallumo  
al *vivo* por vi nova!

## Tria letero

Vi povas dubi pri *ĉio* – ankaŭ pri mi – sed ne pri la ebleco veni al vekigo en la lumo de la animo! Sed via lasta letero entenas neniun frazon, kiu ne originis el tia dubo malhelpanta ĉiun spertadon de la animo.

Vi ja povus esti prava, se vi nun skribas al mi, ke – kontraŭe al mia lasta eldiro – vi vidas vin „trotaksata“ *de mi*. Sed tio, kion mi montras al vi kiel ion atingeblan al vi en la malproksimo, tute ne fariĝus malpli certe atingebla por vi rezulte de iu ajn trotaksado de via persono!

Kiam vi estos progresinta tiom, kiom estas necese, por ke vi estu *atinginta* la celon de mi montritan, mi tute certe ne plu „trotaksos“ vin, kondiĉe ke hodiaŭ mi reale vin trotaksus. Sed via – nun tiom vive montriĝanta – penado *plimalgrandigi* vin mem, estas nur reago al via antaŭa anima *troemfazado*, en via propra konscio. Pendola movo al la alia flanko!

Antaŭ ĉio vi nun devas unue veni al *trankvilo* kaj trovi *vian propran mezon!*

Via timo, ke mi povus doni al vi esperon atingi la alstrebatan celon sole pro tio, ke *mi* supozeble ja „trotaksas“ vin, eble povas esti forigata per tiu ĉi mia respondo, ke mi nur vidas vin en la stato, komence

karakteriza de *ĉiuj* homoj anime serĉantaj, preni sin mem *tro grave*. – Sin mem kaj la juĝon de aliuloj!

Sed tio estas kvazaŭ speco de psikofizika infana malsano, kiu povus prezenti kaŭzon por zorgo nur tiam, se ĝi ne estus baldaŭ malaperigata.

Vi hodiaŭ staras je la komenco de vojo, kies celo ja estas pense imagebla al vi, sed kies realo estas nur laŭsuspekte konata al vi. Via vojo estas *en vi mem*, kaj nur *en vi mem* vi iam trovos vin je la celo de tiu ĉi vojo. Sed en vi mem estas ankaŭ ĉiuj tiuj arbarlagetoj, marĉoj kaj flakoj, en kiuj vi ĝis nun tiom ŝatis rigardi vin.

Vi certe scias, kion mi celas diri, kvankam mi tie ĉi intence ne uzas terminojn de la psikologio por nomi tiujn ĉi specojn de speguliĝo. Pri tiu memrigardado kaj deziro vidi sin bilde vi devos iom post iom lerni *tute rezigni*, se vi, en la vojo al vi mem, ne volas perdi la celon el la vido.

Vi estas tute la sama, indifere, ĉu vi *plaĉas* al vi en la bildo rezultanta el viaj memspeguliĝoj, aŭ *ne*! Sed ĉiu spegula bildo, interne formita de vi, de la tiutempa stato de via konscio *fiksas* vin en la loko, kiun per plupaŝado vi ĝuste lernu *forlasi*. –

Kiel kio vi estas rigardata de vi mem kaj de aliuloj en tiu ĉi tera vivo: – kiun pozicion vi okupas, kiun gravecon oni atribuas al tiu pozicio, – ĉu vi devas ordoni aŭ obei, kaj mil aliaj surteraj gravaĵoj, al kiuj vi sentas vin katenita, aŭ de kiuj vi tute ne deziras esti liberigita, – ĉio tio estas *aferoj*

*inter naskiĝo kaj tombo.* – Sed tio, kio volas esti serĉata kaj trovata de vi en via animo, estas *io eterna*, kio restas netuŝita de ĉio, kio tie ĉi surtere estas laŭ tera valoro tiom grava al vi.

Tamen vi povas strebi al tio, kion vi en via tera ekzisto taksas alte laŭ tera valoro, sed, farante tion, ne neglektu aŭ preterlasu tion vian eternan!

Via tera korpo estas nur la *ateliero*, en kiu vi povas doni *formon* al tio via eterna. – Ĝi prezentas al vi la *ilon*, kiun vi bezonas por memformado, sed *nur vi mem* estigas al vi per ĝi *la formon!*

Se vi ne *mem formis* al vi tiun ĉi vian spiritan „formon“ el tio via eterna, tiam estas tute neeble al vi atingi konscion en *tio via eterna* tiel, ke ĝi estas identa kun via persona *tera* konscio! – Vidate el la vidpunkto de la tera homo katenita de siaj fizikaj, animalaj sensoj, tio via *eterna* estis ankaŭ tio via *plej malfremda*, ĉar la tera homo scias nenion pri ĝi kaj plejfavoraokaze, per persvado en tre dubinda maniero, povas esti motivata „kredi“ je ĝi. Sed vi fariĝos konscia pri tio via eterna kiel *neperdebla* posedaĵo, tuj kiam vi donis al ĝi la spiritan formon al vi adekvatan, kiun povas formi nur *vi mem* per kontinua, al vi konforma *voloteniĝo*.

## Kvara letero

Ŝajnus al mi maljustaĵo, se mi lasus nerispondita pli longe ol absolute necese tiun ĉi vian lastan leteron, kiu entenas tiom virecan, klaran decidon. Tial mi prokrastas pli ol unu aferon de mi farendan, por ke vi tuj aŭdu de mi.

Sed mi ankaŭ komprenas vian zorgon kaj volonte volas konstrui al via naturo – kiu, laŭ via diro, estas „seka kaj, rezulte de via profesio, plejparte racie agordita“ – ĉiujn pontojn, kiujn ĝi eble bezonas.

Senzorge indiku al mi viajn malfacilaĵojn!

Estus instruo al mi mem, se mi malkovrus, ke mi povus transfandi tion, kion mi donis en miaj libroj laŭ mia propra maniero, en formon pli bone konatan kaj konforman al vi. Ne malpli mi estas preta lernante ekkoni el la vortoj de serioza kaj sobre juĝanta viro, *kio* mi eble lasis firmbazajn demandojn nekonsideritaj, aŭ eble povus esti prezentinta al la leganto taskojn, kiujn li en la fluo de la tempo ne povus ekmastru.

Sed rilate al via mencio pri la „nekutima skriba stilo“, en kiu mi traktis tion prezentandan en la libroj, mi povas diri en plena objektiveco, ke mi ankoraŭ skribis ne eĉ unu traktaĵon, en kiu restus lasite al mia libera arbitro, diri tion

direndan en la tiama tempo *aliamaniere* ol ĝi nun troviĝas esprimita.

Neniam kaj nenie mi *serĉis* parolan aŭ skriban stilon, sed ĉiam skribis ĉion tiel, kiel ĝi devis formiĝi al mi laŭ spirite ekzistantaj leĝoj de sonvaloroj.

Kun iometo da literatura ambicio mi certe estus facile povinta uzi stilon kutiman kaj konforman al la tempo. Sed estis kaj estas malproksima de mi ĉia literatura strebado, kaj krome mi estas, kun mia tuta amo, multe tro proksima ĉe ĉiu *vorto*, kiun mi uzas, – ĉe ĉiu *litero*, kiun mi skribas, – ol ke mi krome povus havi zorgon pri tio, kiel tio direnda de mi povas esti alkonformigata al la ĝenerala literaturo de mia tempo. Kie mi trovas vortojn tiajn, kiajn mi bezonas, mi ne havas la deziron trovi aliajn, kaj kie tiuj ekzistantaj *ne* sufiĉas al mi, mi kreas al mi la necesan vortformon.

Cetere, mi povas skribi nenion, kion mi ne sentas plej klare kiel *parolita*. Tio eksplikas ĉion, kio, en mia maniero apartigi la frazojn kaj aranĝi la interpunkcion, unuavide povus aspekti kiel afektita strangaĵo. Ĉar vi nun posedas tion skribitan de mi en la fluo de du jardekoj, vi rimarkos en kelkaj el la unue aperintaj libroj la ofta uzado de haltostrekoj. Tio rezultas el la bezono havi signon por pli aŭ malpli longaj *paŭzoj* inter vortgrupoj sentitaj kiel *parolitaj*. La embarasa miskompreno de mia intenco poste igis min limigi la uzon de tiu signo al la mezuro absolute necesa.

Tamen estas ankoraŭ necesa, ke la leganto imagu al si tion skribitan kiel sone *parolitan*, se li ne volas perdi al si mem ion tre esencan, kion la legitaj frazoj havas por doni al lia plejinterno.

Tio supozeble kompletigas la unuajn petitajn klarigojn, pri kiuj mi opinias, ke mi ilin ŝuldas al vi, nun ke mi konas vian decidon ĉiutage dediĉi trankvilan horon al la energia, kvankam unue pli-malpli racia studado de miaj instruaj tekstoj.

Rilate al la *vico* da libroj eble observenda en tiu ĉi studado, mi prefere lasas al vi ĉiun liberecon, kvankam mi dezirus, ke kelkaj el ili estu unue legataj, *antaŭ ol* oni transiras al aliaj, kiuj jam *premisas* certajn imagojn en sufiĉa klareco. Sed mi konsilas al vi, ke, ĉiufoje kiam vi finis unu el la libroj kaj estas prenonta alian, vi elektu nur libron, kiu ĉe unua foliumado tuj forte impresas vin. Sed se vi nur kun peno povas plulegi, tiam vi prefere remetu tian libron por pli malfrua tempo, kaj elektu alian, pri kiu vi kredas, ke vi povas pli facile konatiĝi kun ĝi.

Miaj deziroj de beno estas kun vi!

## Kvina letero

Ke vi nur nun, post kvar monatoj, povis ree skribi al mi, vere ne postulas peton pri pardono.

Aparte de tio, ke mi scias pri via konstanta intensa aktiveco profesia, mi certe povis supozi, ke vi prezentus al mi demandojn *nur tiam*, kiam, post ĉiu ekzamenado de la koncerna teksto, ŝajnus al vi neeble mem respondi tiujn demandojn, kaj tia ekzamenado bezonas tempon! Se oni seninterrompe kaj ne limigite de maksimuma nombro de horoj devas uzi siajn fortorezervojn fore trans la mezuron disponeblan, por plenumi eĉ nur la plej urĝan parton de sia labordevo – kiel estas la okazo ĉe mi –, tiam periodo de kvar monatoj povas kvazaŭ kuntiriĝi tiom, ke ĝi estas sentata apenaŭ kiel la periodo de kvar tagoj.

Mi komprenas, ke vi devis unue havigi al vi „ĝeneralan superrigardon“ pri la libroj kaj iliaj unuopaj ĉapitroj, antaŭ ol komenci trastudi la diversajn tekstojn. Sed mi devas esprimi mian miron, ke vi sukcesis fari tian superrigardon en la relative mallonga tempo de kvar monatoj, dum kiuj vi ankaŭ havis sufiĉe da aliaj aferoj por fari. Viaj ĝisnunaj observoj *konfirmas* tiun sukceson!

Estis feliĉa ideo, travidi la librojn kaj libretojn en la vico de ilia *dato de apero*, kaj estis tre bonvena al mi via rimarko, ke tio pli malfrue legita senpene malfermis al mi multo, kio jam en la „Libro pri la vivanta Dio“ ŝajnis al mi malfermebla nur en tiu ĉi maniero. Krome, tre certan kaj subtilan sentemon montras al mi tio, ke vi rimarkis en tiu ĉi unua kaj kelkaj sekvantaj libroj, inter la linioj kaj en la teksto mem, la batalon, kiun ree kaj ree postulis de mi la *devo konfesi* antaŭ la tuta mondo, *ke mi estas tiu, kiu mi estas*. Tial mi unue, nur kontraŭvole, donis raportojn tute

ĝeneralajn, kiuj ankoraŭ *kaŝis* pli ol ili, devigite, *senvualigis*. Sed ankoraŭ *hodiaŭ* mi kaŝas pli ol estas al mi eble kaj elteneble konfesi, se ne aliuloj per si mem tute klare rimarkas tion.

Cetere, vi, per via delikata sentemo, iam trovos ankaŭ en miaj instruaj tekstoj kelkajn konfesojn miajn pri mi mem, kiujn mi devis doni, sed kovris per densa *vualo* antaŭ ĉiuj, por kiuj ili havus nenian utilon. Mi konfesas, ke kelkfoje mi petole ĝojis, se mi sukcesis plenumi mian devon de memkonfeso tiel, ke nur tre malmultaj, *veraj rajtigitoj* kapablis malkovri tion, kio kaŝiĝis kaj kaŝiĝas sub la vualo antaŭ nerajtigitoj, kvankam la *formo* de la vualo estas neniel senvalora, aŭ eĉ povus kaŭzi eraron en ies animo. Ĉio ĉi estas io tute alia ol afektita sekreteco! Male, ĝi estas protekto, kiun mi devis krei al mi: protekto antaŭ malsaĝaj imputoj kaj groteska miskompreno.

Miaj motivoj aperos al vi sufiĉe gravaj, se vi tenas en via rigardo, ke mia eterna esto, sublime fora de ĉia tera influo, ja estas konata al mi, en plej klara spertado, kiel super-tempa, sed certe ne signifas al mi ion super-*naturan*, ĉar mi ĉiam estis konscia, el la spirita sfero, pri ĝia *spirita naturo*, estanta la mia. Tempe limigita problemo prezentiĝis – post kiam *terhoma korpo* estis naskita al mi – per la neceso (certasence troŝarĝanta ĉian homan spertovolon) ekkoni min kiel *eternan homon* en la terhoma konscio. Ke tiu ĉi postulo bezonis jardekojn por fine tute plenumiĝi en la tera sfero, kaj ke la rezisto de homa spertovolo ree kaj ree estis obstaklo sur la vojo al nelimigita *povado* konscii sin mem, estas nur *laŭnatura* (nun en la *tera* senco). Kun speco de

forta spitado, kiu kelkfoje povas konduki al preskaŭ burleskaj situacioj, la terhoma spertovolo ĉiam denove defendas sin kontraŭ la okupado de la homo nutranta ĝin fare de io *super*-natura, pri kiu la spertovolo antaŭe ne scias, ĉu ĝi ne definitive rifuzos al ĝi ĉian plenumiĝon.

Mi ne pensis, ke tiuj ĉi aferoj estus priparolataj inter ni tiom baldaŭ, sed supozeble via naturo postulas, ke vi helpu al vi mem sen meti apartajn demandojn, kaj ke vi dekomence alfrontu faktojn, pri kiuj aliaj serĉantoj dum sia anima progresado eble unue forte ŝokiĝas.

Mi havas la senton, ke vi bezonos sur via vojo malpli „helpon“ ol *konfirmon*, kaj ke eĉ tiun vi preskaŭ ne bezonus.

La interna, pure *spirita* helpo estas videble proksima al vi.

Kiuj estas ankoraŭ ligitaj  
de songoj de sia orgojlo,  
Certe *ne* estas *tiuj*,  
kiuj trovas tion serĉitan!  
Nur kiuj *entombigas*  
sin mem en si mem,  
Tiuj *ricevas* en si mem  
la arde sopiritajn donojn ...

## Sesa letero

Se vi mem nun miras, ke vi iam kredis, ke vi devas meti al mi tiom da demandoj rilatantaj al la teksto, dum la vortoj de miaj libroj nun fariĝas al vi „de tago al tago pli facile alireblaj“, tiam mi povas nur bonvenigi tian al kutimiĝon. Sed ne pro tio, ke vi per tio deprenas de mi la penon doni iun aŭ alian eksplikon, sed antaŭ ĉio pro vi mem. –

Nur kion vi *mem* kapablas respondi al vi, tio estas *vere* respondita por vi! Sed se vi ricevas respondon *de ekstere*, tio povas – plejfavoraokaze – montri nur *la direkton*, en kiu kuŝas la de vi dezirata solvo de demando, sed ankaŭ tiam estos sole *via* tasko trovi kaj *alproprigi* al vi la respondon. Ĉiu respondo venanta de ekstere, kiun vi ne konkeras, kaŭzas prematecon kaj estigas ĉiam novajn akcesorajn demandojn, kiuj havas nenian utilon.

Vi vidos pli kaj pli klare, ke en miaj libroj vere *ĉiuj* demandoj rilatantaj al la eterna spiriteco de la homo estas responditaj tiom, kiom la cerba kapablo formi kaj uzi nociojn tion permesas. Ankaŭ tio montras nur *la direkton*, en kiun la animo devas turni sin, se ĝi volas mem respondi al si demandon. Kiu estas sincera antaŭ si mem, tiu tre baldaŭ scios, ĉu iu loko en miaj instruaj tekstoj rilatas al li kaj lia individua situacio aŭ ne, kvankam li certe ne povas atendi, ke li povos trovi ĉiun eblan nuancon de sperto, kies *elementojn* mi diskutas, eksplicite *menciita* en miaj vortoj.

Sed intence mi detenas min de la uzo de kutimaj difinoj derivitaj de filozofiaj kaj teologiaj opinioj, ĉar en mia verkaro temas pri la spertado de la *realo*, kiu *komenciĝas* ĝuste tie, kie *finiĝas* la filozofioj kaj teologioj, kiujn la serĉanta terhoma spirito kreis al si kiel pensajn vojojn al la eterna spirito. Se homoj filozofie aŭ teologie ligitaj volas profiti de mia verkaro, tio povas okazi nur tiam, kiam ili interne kreskis super sin mem kaj sekve super sian kredon, ke ili en sia ligiteco posedas la „veron“ pri la realo.

Tio ne estas nura aserto, kiu ja bezonus pruvon, sed tie ĉi mi donas al vi, necese anticipi, informon pri fakto, kiun devas renkonti ĉiu serĉanto serioze okupiĝanta pri miaj libroj. Oni devas esti veninta *al la fino* de siaj filozofiaj kaj teologiaj trovaĵoj, antaŭ ol oni trovas la *vojon* en tiun eternan realon, sur kiu homo atingas la celon des pli frue, ju malpli li estas ŝargita per elpensitaĵoj.

Vi eble rimarkis jam dum la unua trarigardo de miaj skriboj, kun kia toleremo mi renkontas ĉiun religian aŭ pense trovitan homan opinion, se ĝi montriĝas, eĉ nur en *metafora* senco, vere konforma al la eterna spirita realo.

Sed tiu mia toleremo vere ne forlogu la leganton al la erara supozo, ke mi per tio volas diri, ke ankaŭ filozofia kaj teologia pensado iam povus konduki en la eternan realon! Mi renkontas tiun homan agadon kun komprenemo kaj respekto nur pro ĝiaj puraj motivoj, kaj honoras la *partajn verojn* pri la eterna realo, kiuj estas tiamaniere troveblaj aŭ jam trovitaj.

Sed la *sola* vojo kondukanta en la *realon* *ĉiutempe* „eternan“ estas vojo de *fariĝado*, – ne nur de ekkonado, – kaj por marki tiun ĉi vojon plej klare estas skribita ĉio, kion mi skribis.

Estu benita dum via migrado, nun komencita, sur tiu ĉi vojo!

## Sepa letero

Vi demandas, ĉu mi aŭdis ankaŭ de aliaj legantoj de miaj libroj ion similan al tio, kio konsistigas la ĉefan enhavon de via lasta, tiom signifoplena letero. La respondon vi trovas en la sama ĉapitro, kiun vi citas. Sed tiu respondo staras jam sur la dua paĝo de la ĉapitro „*La tabernaklo de Dio estas kun la homoj*“ (en „La libro pri la Vivanta Dio“), citita de vi nur rilate la sekvan parton de la teksto.

Sed se vi atribuas gravecon al tio, ke vi ekde la plej frua junula aĝo portis en vi „la firman *certecon*“ pri la ekzisto de „rondo de viroj benon disvastigantaj, profunde kaŝita kaj tute nekonata al la mondo“, kaj ke vi sentis vin „iel interligita“ kun ili, mi devas nun diri, ke pri tia „*certeco*“ en diversa intenseco estis *raportate* al mi nur tiam, kiam la „Libro pri la vivanta Dio“ jam estis *aperinta*. Sed tiam treege ofte, kaj fare de homoj, kiuj montris tre malgrandan

dispozicion al fantaziaj revoj. Spertante tian „certecon“, vi do estas en agrabla kaj impona kompanio.

Rilate la lokon sur la tero, pri kiu vi supozas, ke tie troviĝas la rondo disvastiganta benon kaj iel interligita kun vi, vi certe ne estas tiom malproksima de la realo kiom aliuloj, kiuj konfesis al mi, ke ili supozis la loĝlokon de tiu rondo, sentita kun certeco, en „armena monaĥejo en Kaŭkazo“, sur iu insulo en Pacifiko, aŭ eĉ en grandega metropolo. La de vi menciita „burgo“ sur tre alta monto kaj „meze de neĝo kaj glacio“ estas imago, kiu povus baziĝi preskaŭ sur pensa komuniko de certaj lokaj bildoj bone konataj al ĉiuj apartenantaj al tiu rondo, kiu scias, ke en alte signifa loko estas kaŝita sanktejo, kiu estas alirebla sole al la siaj... Sed la plejsanktuaĵo de tiu loko estas perceptebla nur al homoj, kies *spiritaj* sensoj kapablas klare kaj maldorme percepti formaĵojn *el spirita substanco*. Al la nuraj *terkorpaj* sensoj estas videbla en la sama loko nur io terece materia kaj trompa, – kaj eĉ la plej bona objektivo de fotografaj aparatoj estus nekapabla registri sur la lumimpresebla emulsio ion alian ol nuran teran trompobildon. Tio, kio en tiu ĉi *fiksa loko* de la tero estas starigita el kristale klara eterna spirita substanco, neniam povas esti vizitata eĉ de la loke plej proksimaj membroj de la malgranda rondo, kiun vi sentas tiom certe, kun la *teranimala* korpo. Ĉiu, kiu tie ĉi estas rajtigita eniri, venas en *spiritspaca* memformaĵo, kiu konformas al li multe pli ol lia tera korpo kaj ne estas subordigita al iu de la malhelpoj direktiĝantaj al ekstera materio. En tiu ĉi vera *templo de la eterneco* sur la tero nenia kulto estas celebrata, nek estas okazigataj homilioj. Kiuj tie ĉi unuiĝas

kiel veraj sacerdotoj, instalitaj de la eterna spirito, leviĝas tiuĉiloke en la *plenan* transsubstancigadon – kiu estas neniam kaj en *neniu* alia surtera loko *ebla* pro spiritsubstancaj kondiĉoj – al la *absoluta* unuiĝo kun la *Patro*: en absolutan, al neniu „mistikulo“ eĉ nur imageblan „mistikan unuiĝon“. En tiu ĉi stato tralumigita de eterna amo ili kondukas riverojn da beno sur la tuta tero al homoj ricevemaj por tio, kiuj nur el tiu ĉi loko povas esti atingataj tiel, ke ili ankaŭ *kapablas enpreni* tion, por kio ili faris sin pretaj akcepti. Ĉar tiu *loko* de la vera surtera templo de la eterneco ne estas tro malsimila al „burgo sur alta monto, meze de neĝo kaj glacio“, via imago kondukis vin sufiĉe proksimen al la realo.

Distingenda de la situo de la spirita templo estas loko, *perceptebla* al teraj sensoj, de *komuna vivado* de kelkaj malmultaj, kiuj apartenas al tiu templo en *aparta* maniero, sed ĝi situas nek „sur alta monto“ nek „meze de neĝo kaj glacio“ kaj havas por ili, kiuj tie vivas siamaniere kiel aliaj homoj, esence nur la signifon de memelektita loĝloko.

Ke la tie ĉi loĝantoj *devas* sin izoli, kaj konstante teni sin izolitaj, kontraŭ ĉio en la ekstera mondo, baziĝas sur la naturo de ilia aparta spirita tasko. Krome, estas bone aranĝite *ankaŭ de ekstere*, ke ili neniam estos devigataj forlasi sian kaŝitecon, eĉ se la banala „civilizacio“ de eŭropa origino povus proksimiĝi al ili ankoraŭ pli, ol tio povis okazi ĝis hodiaŭ.

Kion vi skribas al mi pri sentata *ligo* inter vi kaj la spirita rondo tiom certe sentita de vi, tio neniel estas

memtrompo. Sed devas klariĝi al vi, kiel tiu interligiteco estiĝas. Permesu al mi menciigi tie ĉi, cele al komparo, du inventaĵojn el la kampo de elektroteknika sontranssendado, ĉar estas grave al mi, ke vi ne alkroĉiĝu al malĝustaj imagoj. Tio, kion vi sentas kiel „interligon“, estas komparebla ne kun *telefona* konekto, per kiu parolanto estas interligita kun *unu* aŭdanto, sed prefere kun *radio*-mesaĝo disvastigata per certaj ondovibroj super la tutan teron.

Sur *multaj* ondolongoj eliras tute *diferencaj* elsendoj, sed *vi* ricevas nur tion, kio konformas al *via* alĝustiĝo.

*Ĉiu* influado fare de la lumantoj de la pralumo estu rigardata kiel procedo metode analoga al la ĵus donita komparo, ankaŭ tie, kie kelkfoje tutaj popoloj estis sub tia influo, kiu ĉiam kaj sub ĉiuj cirkonstancoj povis rilati nur al aferoj de la *eterna spirito*, – neniam al streboj celantaj la atingon de materia prospero, aŭ eĉ al prestiĝobataloj de iu politiko!

El la eterna spirito povas ricevi progresigon sole nur tiuj homaj volado kaj agado, kiuj rekondukas en la eternan spiritan realon. Nur la unuopula krea forto celanta *al la eterna spirito*, same kiel la disvolvo de plej alta potenco fare de tutaj popoloj kaj nacioj per pure *spiritaj* fortoj, povas ricevi la spiritan influon elirantan el la templo de eterneco sur tiu ĉi tero. Tion mi aldonis rilate vian aludon al miaj vortoj en la *dua* ĉapitro de la „Libro pri la vivanta Dio“.

Bonvolu intertempe bone pripensi ĉion hodiaŭ de mi pritraktitan, ĝis mi eble baldaŭ povos repreni la fadenon. La luma beno el la templo de la eterneco trovu vin ĉiutempe preta ricevi!

## Oka letero

Kion mi havas por diri pri via nun ricevita raporto, tio fariĝis al mi la okazo por formi la sekvantajn ritmajn versaĵojn, kiuj koncize montru al vi, ke vi per via propra sentado ĝuste interpretis la donitajn interrilatojn. Sed tie ĉi sub „Ni“ mi parolas ne en „pluralo de majesto“, sed el mia eterna spirita esto, en kiu mi estas ĉiam en plej plena *unuiĝo* kun miaj spiritaj fratoj en la eterna lumo. En tiuj ĉi versoj mi parolas el la unuiĝo nur kun *tiuj* el miaj spiritaj fratoj, kiuj, same kiel mi, estas ligitaj al la *terfizika* domo por plenumi sian taskon, kvankam laŭspirite la tasko de ĉiu unuopa el ili diferencas de tiu de ĉiuj aliaj.

Uzante tiun ĉi okazon, mi plej insiste instrukas vin ĉiam strikte atenti la *starejon*, kiu montriĝas el la *enhavo* de ĉiu unuopa versaĵo, ĉar mi, kiel tera homo, estas, kiel dirite en la lasta verso de la unua formaĵo, kunfandita kun mia spirita esto sen ebleco de malligiĝo.

Ni

Ni estas la vokitaj atestantoj,

Ĉar ni *vivas* en l' eterna lumo!  
Nia atesto neniam flekseblas,  
Ĉar ĝi pesas per pezo *provita*.

Ni estas, kio ni estis eterne,  
En la „Patro“: – en la eterna esto! –  
Sed ni trovis, laŭ *spirita* elekto,  
Ankaŭ *tempan*, teran „*sanktujon*“ ...

Ni jam trovis ĝin laŭspirite  
Longe *antaŭ* la estiĝo de l' ter',  
Sed kio sin *tempe* ligis,  
Tion kunligis jam *praeterna* ligil'.

Por ĉiam ni restas unuigitaj  
Al la terulo, kiu tie ĉi nin „parolas“:  
Ardigita kaj purigita en „*fajro*“,  
Li *kunfandiĝis* kun ni en *lumo*!

\*

I

Mi ne estas „mi“,  
Kiel unu, kiu *ion limigantan*  
Nomas „mi“,  
Ĉar li ekkonas en si  
Nur ion terece *pereontan*.

Al mi, mi estas „mi“  
*En lumsolvita esto*.  
En tera limigiteco

Ekzistas mia bildo kaj ŝajno,  
Estante al si mem turmento  
Kaj portempa suferado!

## II

Kie mi estas, tie estas *eterneco*,  
Ĉar „spaco“ *generita de l' eterno*  
Plenigas la teran spacon,  
Kiun miaj tagoj plenigas en la *tempo*.

Min mem mi donis  
Al tiu ĉi tera korpo –  
Al kiu mi nun fariĝas  
Suferokaŭzo kaj konsumanto –  
Por ke la „spaco“ de la eterneco  
Tute ĝin plenu,  
Kaj senvualigu *ion eternan*  
Al tio tera en si.

## III

Kiam mi el alte sublima ŝirmejo  
Alportas al vi subliman donon,  
Mi donacas al vi  
Ne nur saĝan *vorton*,  
Kvazaŭ mi estus  
Nur la *gardanto* de l' vorto.

Kion mi donas al vi,  
Tio estas kaj restas *mia propraĵo*,

Eĉ se mi donas ĝin al nenombritaj,  
Kaj mi povas al vi montri  
Vojon kaj celon nur tial,  
Ĉar *mi* en ĉiu el miaj vortoj *vivas!*

Mi supozas, ke tiuj versaĵoj ne vekos en vi novajn demandojn, sed anstataŭe respondos ankaŭ ion, kion mi vidas ekaperi inter la linioj de via kara letero kiel eble *venonta* demando.

Sed ankaŭ ĉi tie vi akceptu nenion sen propra ekzamenado. Nur se tio via propra praeterna volonte donas al vi sian konsenton, viaj – eble nur kaŝitaj – duboj estas vere venkitaj kaj nur nun ne plu povas endanĝerigi vian vojon!

Mi esperas, ke mi proksimatepe povos preparoli kelkajn aferojn, kiujn vi tuŝis en via antaŭlasta letero. Sed se eble iom longa tempo pasos ĝis tiam, mi anticipe petas vin ne atendi la poŝton senpacience. Tio, kion mi ankoraŭ havas por diri al vi rilate al la spiritaj gvidado kaj helpo prezentitaj de la lumantoj de la pralumo, atingus vin ĝustatempe eĉ post multaj monatoj.

Mi benas vin kaj sendas al vi ĉiun helpon, kiun vi bezonas sur la vojo al tio via eterna spirita.

## Naŭa letero

Tio, kion mi laste skribis al vi kaj vidis esprimita plej bone per ritmaj versaĵoj, certe ne postulis respondon, kaj tamen ĝojigis min viaj karaj linioj venintaj el plej profunda animo, ĉar ili montras al mi, ke ankaŭ ĉifoje ĉio estis enprenata plene en la senco, en kiu mi estis doninta ĝin.

Sed kiam mi forsendis ĝin, mi apenaŭ estus supozinta, ke mi aŭdos de vi tion, kion vi nun havas por skribi al mi.

Mi petas vin kontentiĝi je la respondo, ke tiun ekkonon al vi donis „vere ne karno kaj sango“, sed *tio via propria eterna*, el kio sola la vero pri la realo, en kiu ĝi mem vivas, povas esti akirata. La ekkonoj de la sango – tio signifas: de la terhomaj sentado kaj cerba elpensado, ligitaj al animale malvasta kondiĉiteco – rilatas al tio, kion nur tio propria eterna kapablas doni, kiel ekzemple la „vivo“ de malmola, rigida ŝtono en la fluejo de ajna proksima rivereto rilatas al la plej altaj vivomanifestaĵoj konataj al ni. Nur el tio eterna povas veni al la homo *ekkono* de tio eterna!

Sed nun mi volas uzi tiun ĉi okazon ankaŭ por finfine doni al vi detalajn sciigojn, kiuj devus esti entenataj jam en mia respondo al viaj rimarkoj rilate la ĉapitron „La tabernaklo de Dio estas kun la homoj“, se ne tiutempe eksteraj cirkonstancoj estus devigintaj min fini mian leteron.

Du ĝenerale konataj kaj multe uzataj inventaĵoj prezentiĝis al mi por komparo, kiam mi sciigis vin pri la maniero, en kiu la „interligo“ de la animoj sur la tero kun la lumantoj de la pralumo efektiviĝas.

Kio ankoraŭ estu dirata tie ĉi, mi ja prezentis en unu de la lastaj ĉapitroj de la libro „pri la vivanta Dio“ – nome en la instrua teksto „*En la oriento loĝas la lumo*“ – tiom klare, ke misinterpretado de la tieaj sciigoj aperas al mi certgrade eksplikebla nur per tre malatenta legado. Sed ĉar mi ree kaj ree ricevis raportojn, en kiuj oni rakontis al mi en plej ekscitita tono de graveco pri *internaj voĉoj*, supozante, ke devas temi pri la „voĉo“ de gvidanta „majstro“, do de lumanto de la pralumo, mi deziras urĝe atentigi vin – profilaktike, por evitigi al vi senutilan maltrankviliĝon – pri tio, kion mi *fakte* diras en la supre menciita teksto kaj en la ĉefa ĉapitro „La vojo“.

Estas bezonata vere tre kruda misinterpretado de miaj vortoj uzataj en tiuj ĉi lokoj kaj precipe en la libro „*Releviĝo*“, por veni al la opinio, *kontraŭanta* ĉion de mi diritan, ke mi celis paroli pri „internaj voĉoj“, kiujn estigas al si nerve ekscititaj ekstazuloj, aŭ homoj prestiĝoavidaj stimulegitaj per imaga memtroaltigado, kiuj nesciante estas viktimoj de *portempa* skizofrenio, rezultanta de certaj eksteraj influoj, aŭ de la *permanenta* formo de tiu ĉi psikozo.

Ĝuste kontraŭ *tiaj „voĉoj“* mi ĉiumaniere *avertas!*

Mi vere rajtas atendi, ke oni komprenu la bildece uzatajn vortojn „voĉo“ kaj „paroli“ nur en la maniero, en kiu ili estas donitaj kaj ree kaj ree *eksplikitaj!* Mi ja diras sufiĉe klare, ke tiu „parolado“ estu neniookaze komparata kun la uzado de homa lingvo, sed estas *interna klariĝo de tio antaŭe neklara al la imago*, kaŭzita de influa efiko de estulo, kiu mem vivas en plej pura klareco de sia ekkonado. Mi diras tion ankaŭ per aliaj vortoj, rezultantaj el la altnivela lingvoformo, sed la nura fakto, ke mi metas la vortojn – pri kiuj oni pensas esti tute rajtigita uzi ilin en la rekte kontraŭa senco – inter citiloj, devus sufiĉe klare montri al ĉiu rezonema homo, ke mi emfazas ilian distancigan metaforecon. Sed *laŭvorte* mi eksplicite diras en la ĉapitro „En la oriento loĝas la lumo“, ke estas „parolate“ en la interno de l’ serĉanto „*per senpera estigo de interna klareco*, – *sen* vortoj de la buŝa parolo.“ ... „Ne en iu ajn ... homa lingvo.“ Tio ja certe estas sufiĉe nemiskomprenebla.

Se mi en la ĉefa ĉapitro „*La vojo*“ krome mencias la *eblecon* ekzistantan por la spirita instruanto en certaj cirkonstancoj donitaj en la instruato, nome la ebleco *montri* sin en „magia bildo“ al tiu ricevanta klarigon, mi faras tion *pro kompleteco*, kaj mi ne lasas ekesti iun penson pri tio, ke tiu „bildo“ povus esti la majstro *mem*. Samtempe mi klare diras, ke tute ne temas pri privilegio, se homo havas la *taŭgecon* por projekciado de tia bildo el si mem. Sed mi ne povis lasi nemenciita, en instrua libro pri spiritaj aferoj, la *eblecon* konatan al mi, eĉ se ĝi efektiviĝas ekstreme rare kaj estas kondiĉita de apudaj cirkonstancoj, kiuj apenaŭ povas ekzisti en eŭropano.

Ĉio tio apenaŭ koncernas vin kiel propra demando, ĉar vi kutimas atenti ĉiun el miaj vortoj tre ekzakte, kiel mi jam de longe scias.

Sed tute ne estas neeble, ke renkontas vin aliaj legantoj de miaj libroj, kiuj misteravoĉe rakontas al vi pri siaj „internaj voĉoj“, kaj erare opinias, ke tiu fenomeno, kiu, por ĉiuj homoj ne sisteme instruitaj por distingi spiritajn aferojn, estas *ĉiam kaj en ĉiuj cirkonstancoj* minace danĝera, trovas aprobon en miaj libroj. Vidalvide al tiaj homoj, kiuj pleje estas fanatikaj sklavoj de sia vanta animo, kaj kvazaŭ obsedataj de sia revo pri sia laŭsupoza „alta gvidantaro“, vi nepre devas esti tute *certa pri vi kaj via afero*. Alie vi atribuos gravecon al tiaj raporto kaj oni eble sukcesos kredigi vin, ke vi ankoraŭ ne estas „tiom progresinta“ kiom tiuj homoj, – aŭ ke via naturo viaopinie tiom „seka kaj sobra“ probable estas nesuperebla obstaklo, – krom multaj similaj duboj de homoj kun dispozicio por memkritiko kaj ne tro granda indulgemo al si mem.

Por ke vi vidu tute klare, estu nun ankoraŭ atentigate pri miskompreno, kiun mi vere ne timis renkonti, antaŭ ol mi devis je mia surprizo konstati, kiom multe disvastiĝinta ĝi estas. Oni povus esti tentata supozi, ke parolado en bildoj kaj paraboloj, kiun la naturo de spiritaj aferoj sugestas kaj ofte eĉ postulas, estas tute ne plu komprenata de nuntempaj homoj, kiuj kutimas legi gazetraportojn ĝissate. Alie ne estus eble, ke nocioj kiel „spirita proksimeco“, „alta helpo“ fare de tiuj komisiitaj por tio, aŭ „spirita gvidado“, „spirita protektado“ per la altaj helpantoj kapablaj por tio, tiom ofte

estus tro krude interpretataj, kvazaŭ ili signifus, ke la lumantoj de la pralumo devus kiel nevidebla figuro proksimigi sin al la surtera loko de homo bezonanta helpon aŭ gvidadon, por ke ili spertu ilian benodonantan *spiritan* proksimecon.

Tio, kion celas diri la supraj kaj similaj vortoj en miaj libroj, okazas en *esence alia* maniero. La komprenon por tio oni vere devus premiĉi ĉe penskapablaj homoj kiel plenumitan postulon de la logiko, ĉar kiel oni povas perdiĝi en la supozo, ke la malmultaj viroj sur tiu ĉi tero, *kapablaj* spirite helpi, kune kun ĉiuj siaj fratoj *ne* vivantaj en teranimala korpo, estas sufiĉaj rilate al la nombro de homoj sur la tero por persone proksimiĝi en nevidebla korpo al ĉiu, al kiu ili povas helpi kaj kiu vere bezonas ilian helpon?! Ĉu ankaŭ ne estus preskaŭ terura stato, esti ĉie observata de nevideblulo, *kiam* kaj *ĉar* oni sciis, ke tiu plej bonkora helpanto estus proksima ankaŭ kiam lia proksimeco estus *nepetita*? – Feliĉe ekzistas *nenio reala*, kio similus al la kredo de kelkaj homoj, kiuj sin prenas tiom grave, ke ŝajnas al ili certega fakto, ke iliaj etaj kaj pleje tiom trivialaj ĉiutagaj zorgoj devus en la spirito esti ĝenerale konataj ĝis ĉiu intima detalo kaj esti objekto de helpado.

Objekto de helpado estas por tiuj *komisiitaj* helpi inter la lumantoj de la pralumo estas ĉiutempe nur la mizero, bezono de protekto, aŭ neceso de gvidado rilatanta al *tio spirita* en la homo. La homon, kiu estas en tia spirita situacio, ili trovas kun certeco, sen scii ion ajn pri liaj teraj kondiĉoj, kaj sen havi eĉ nur vagan imagon pri liaj ekstera

figuro kaj trajtoj. Temas pri pure *spirita* procedo, kiu seninterrompe rezultigas tiun absolute certan trovadon.

Dum mi en mia tiama letero jam uzis la nociojn „telefono“ kaj „radio“ por komparo, mi hodiaŭ devas peti vin imagi al vi – kvankam la komparo ege lamas ambaŭflanke – ŝaltopanelon de eksterordinara grandeco, sur kies ebena surfaco estas projekciita nemezurebla spaco ĝis preskaŭ mikroskopa redukto. Plie imagu al vi, ke ĉiu surtera animo, dum sia surtera vivo, estas reprezentita sur tiu ebena surfaco per du platenaj elektrodoj videbliĝantaj en unu eta punkto, kaj ke, tuj kiam la animo bezonas spiritan gvidadon aŭ helpon, hela fajrero lumas inter la du elektrodoj seninterrompe ĝis ĉesigo. Kaj nun vi rigardu la lumanton de la pralumo, komisiitan por helpi aŭ gvidi, en tiu ĉi bildo kiel elektroteknikiston, kiu samtempe havas antaŭ si ŝalttabulon kun grandega nombro da leviloj, kaj tuj scias, kian kurenton li devas enŝalti, ĉar la koloro de la fajreroj kaj la aŭdsensaĵoj pri iliaj relative malrapida aŭ pli rapida sinsekvo ekzakte sciigas al li, kia kurento aŭ kurentokombinaĵo estas bezonata en certa okazo por helpo, protekto, aŭ spirita gvidado. Sed ke ĉio alia okazas – por resti fidela al la bildo – „aŭtomate“.

Tiu ĉi komparo povas helpi al vi gajni ĝustan imagon pri la maniero de pure spirita helpado, spirita gvidado, kaj spirita „proksimeco“.

Mi ne bezonas diri al vi, ke certe tia spiritsubstanca aparato neniel kaj nenie ekzistas, sed ke la bildo tie ĉi

skizita provas prezenti en *simbola* maniero la interrilatojn en la strukturo de eterna spirita vivo.

Restante ĉe tiu bildo, mi devas diri, ke la tie ĉi menciita fajrero *neniam* ekaperos inter la elektrodoj, se la homo reprezentita per la paro da elektrodoj ne *atendas* aŭ *postulas* el la ardo de sia koro gvidon, protekton aŭ helpon el la regiono de la esenca substanca spirito, – kaj ankaŭ *neniam*, se li ne mem preparis sin por esti taŭga ricevonto de tia influo. –

La *helpo* kaj la *spirita gvidado* fare de lumanto de la pralumo, do fare de nia eterna komuneco, *neniam* rilatas al aferoj, kiuj devas plenumiĝi *inter naskiĝo kaj tombo*, se ili estu plenumitaj, sed ĉiam nur al la vekigo de la animo en la spirita *eterna* regiono, kaj al la transigo – atingebla per tiu vekigo, kaj laŭeble atingenda jam dum la surtera ekzisto – de la individua *tera* anima konscio en tion propran *eternan* de la homo. –

Tiu ĉi letero, iĝinta sufiĉe longa, estu nun finita, kaj ĝia anima enpreno aparte rekomendita al vi!

Mia beno, kiu atingas vin en la sama maniero parabole priskribita al vi en tiu ĉi letero, fariĝu al vi plej efika heliĝo de via enrigardo en ĉion, kio baziĝas en tio eterna!

## Deka letero

Mi alte ĝojas pri via kompreno de la formo de sendado de spirita helpo kaj gvidado per la solaj havantaj la permeson tiumaniere helpi kaj gvidi, ĉar ili estas komisiitaj por tio de la eterna spirito kaj *povas* helpi, kiun formon mi laste tiom detale eksplikis. Tamen mi rimarkas en via nova letero ankoraŭ certan necertecon, kiu ŝajne ree kaj ree estiĝas per mia diro, ke jam „tutaj popoloj“ kelkfoje estis sub nia spirita influo, t.e. de la lumantoj de la pralumo.

Tie ĉi mi supozeble ja devas refoje atentigi vin, ke *ĉiu* spirita helpo, por kies disdonado la eterna Patro en la pralumo uzas tiujn, kiuj lumas per li en la pralumo – kaj *ne ekzistas iu alia spirita helpo aŭ gvidado efikanta en la terhoman regionon* –, ĉiam povas atingi nur la *individuan animon*. Tial povas okazi spirita influo sur „tutaj popoloj“ necese *nur tie*, kie inter la individuaj animoj, kiuj povas *formi* popolojn, troviĝas multaj, kiuj sciis formi sin mem tiel, ke spirita gvidado povas esti *enprenata* kaj *komprenata*: – ke spirita helpo trovas „*ricevopretajn korojn*“.

Ke spirite sendita influo ĉiam rilatas nur al la *atingo de rekonsciiĝo* de la homa animo *en tio ĝia individua eterna*, kaj libere lasas la aferojn inter naskiĝo kaj tombo al la tera homo mem, mi jam diris en mia lasta letero al vi. Sed ŝajnas, kvazaŭ kaŝitaj deziroj, eble hereditaj, eble

alproprigitaj al vi per edukado, celas krei maltrankvilon en vi, tiel ke vi tro volonte volas rimarki spiritan influon ankaŭ *sur la tutmondan okazadon*.

Sed estas same granda eraro opinii, ke la eterna, dia patro agadas iuloke aŭ en iu homo – ĉu rekte aŭ per sendita spirita gvidado – en la kampo de interna aŭ ekstera politiko de iu popolo konatiĝinta en la mondhistorio, kiel estas malsaĝa eraro kaj montras la timigan fremdecon de la terhoma animo rilate la spiriton, se oni pensas ekvidi en la gravaj *krizoj* de la politiko, kiujn oni nomas „militoj“ kaj „revolucioj“, la efikon de la eterna volo de l' spirito.

En ĉiu ĉi okazado agadas *nur la animalligita homo de la tero*, kaj *kio ajn* urĝas lin agi – inkluzive de ĉiuj lemuraj incitaj vipbatoj el la nevidebla parto de la *fizika* mondo – estas kaŭzita nur en la *tera* sfero, *sen la plej malgranda* kunagado de *spiritaj* influoj kaj fortoj!

Vi diras:  
„La mondhistorio  
Estas la mondjuĝo!“  
Certe!  
Sed juĝo,  
En kiu nur la *homo*  
Eldiras la verdikton pri si *mem!*  
Ĉi tie „Ĉiopovo“  
*Senigis sin* je ĉiu potenco...  
Ĉi tie parolas nur vivo  
*apartigita* disde la spirito  
Kaj *sklavigita al la animalo!*

Kio reale povas havigi al la tera homaro pli bonan sorton jam dum la tempo inter naskiĝo kaj tombo, tio estas sole *la vekigo de multaj unuopaj animoj en tio ilia eterna*. Sed ĉiam estos nur *grupoj* de la homaro, en kiuj sufiĉe da unuopaj animoj, konsciaj pri tio *sia* eterna, kapablas krei vivoformojn vere *indajn* je la eterna homo, kaj nur per sia ekzemplo ili povos iom post iom eltiri aliajn grupojn el la supera potenco de l' animalo. Parto de la tera homaro iam naskos infanojn jam en la patrina ventro malfermitajn al la eterna spirito, dum alia parto – ĉiam nesaveble ligita al la animalo – generos ne la „superhomon“, anoncitan en la vizioj de la poeto de „Zaratuŝtro“, sed la *superanimalon*, kiu pligrandigas la obtuzecon, kruelecon kaj agresemon de animaloj ĝis fina memdiskarnigo...

Jen ĉio, kion mi hodiaŭ volis diri al vi, kaj mi esperas, ke vi estonte ne plu lasas vin delogi per viaj emociaj maldormaj revoj al tio, ke vi pensas vidi en la ekstera monda okazado „la fingron de Dio“ kiel aganton.

Ĉia beno de la lumo estu ĉiam kun vi!

## Dekunua letero

Mi tuj kredas, ke ne estis tute facile al vi, korekti dum la lastaj monatoj vian mondbildon laŭ la enhavo de mia lasta letero. Mi povas bone kompreni tion, ĉar antaŭ kelkaj

jardekoj ankaŭ al mi tute ne estis facile, devi fordoni ĉion, kion mi dejunece estis aŭdinta kaj tiom volonte kredinta, kiam mi unuafoje ekvidis la realon.

Des pli mi ĝojas aŭdi de vi, ke vi nun, post tralaborado de miaj eksplikoj, sentas vin „liberigita de peza kaj parazilanta premo“, kiu „eĉ en la plej serenaj horoj“ neniam forlasis vin. Vere estas apenaŭ eltenebla imago, ke eternaj boneco kaj amo regas tiun ĉi teran mondon en nelimigita potenco kaj tamen povas trankvile lasi okazi ĉion teruran, hororan kaj timigan, kio tie ĉi okazas tago post tago kaj nokto post nokto, kvankam ĝi tiom facile povus esti *preventata* per la plej modesta kvanto da *supermonda* potenco. Tiu imago povas esti sentata kiel plej peza premo sur la animo, kaj estas kompreneble, ke oni eksentas sin kvazaŭ liberigita, kiam oni ekvidis, ke malantaŭ tiu imago ekzistas *nenio reala*, kaj ke ĝi estas nur la sekvo de malĝustaj nocioj pri Dio, kiujn la tera homo estanta malproksima de Dio kreis al si en sia mizero.

Sed vi erarus, se vi konkludus el miaj vortoj, ke mi malestimas ĝenerale ĉiujn aferojn inter naskiĝo kaj tombo. Tiuj aferoj gravas al mi jam tial, ĉar ili povas ekigi sekvojn ne ĝuste „eternajn“, sed ja pluefikantajn transe de sia tempo. Sed ankaŭ dum la tempo atribuita al ili estas plej grava la maniero, en kiu ni frontas al ili, scias akcepti ilin, kaj fine plenumas iliajn postulojn.

Same vi treege erarus, se vi legus el miaj vortoj la instruon, ke ekzistas *absolute neniu* dia-spirita influo sur la terecajn aferojn dum nia vivodaŭro. Tiaj influoj estas ne

nur „eblaj“, sed eĉ ĉiutagaj kaj treege oftaj. Sed ili estas nur la sekvo de la *laŭleĝeca* reagado de eternaj potencoj kaj fortoj de la spirito elradiataj, kies influojn la tera homo ekigas sen ia helpo de alia flanko, – nur per *sia konduto konformanta al la spiritaĵoj*. Granda nombro da religiaj preskriboj – eĉ kelkaj ordonoj de superstiĉo – originas el la observado de ĝusta aŭ malĝusta konduto rilate al tiu spirita laŭleĝeco, kaj estas prezentitaj en kelkaj religiaj *instruoj* de la antikveco – ankaŭ tre klare en la „Psalmoj de David“ – per *personigitaj* kaj *dramigitaj* ekzemploj. Tiu, al kiu la dio de tiuj priskriboj donas ĉiun favoron, ĉiam estas homo, kiu agas *konforme* al la eternaj leĝoj kaj rezulte vidas multon bonan kaj ĝojigan okazi en sia tera vivo. Sed tiu, kiu estas prezentata kiel *malestimanto* de l’ dio: kiel „blasfemanto“ kaj „malsaĝulo“, estas homo, kiu blinde fariĝas viktimo de sia propra *nekonado* de gravaj spiritaĵoj eltroveblaj per spertado. Veninte sur la spuron de tiuj ĉi atestoj de homa estinteco, oni miras pri la spertobazita saĝo, kiun homoj de tempo ŝajnanta al ni ankoraŭ duone barbara povis havigi al si, kaj oni rajte demandas sin, ĉu ni nuntempaj eŭropanoj ne estas *pli grandaj* barbaroj ol iu pli frua generacio ...

Ni ja konas sennombrajn aferojn, kiuj estis fremdaj al tiuj antaŭuloj, sed kun viva empatio mi dubas, ke la tiamaj spertuloj pri la saĝo de sia popolo estus interŝanĝintaj tion, kion ili konis kaj proprasperte sciis, kontraŭ nia tempoligita ĝenerala scio. Oni nur bezonas legi la psalmojn de la Malnova Testamento, – liberiginte sin de la kutima uzomaniero, kiu faras el ili garantiantoj de religia dogmismo, – por ekkoni tre klare, kiom profunde iliaj aŭtoroj, pretekstantaj la aŭtorecon de la maljuna reĝo, estis

eniĝintaj en la sekretojn de spiritaj fortoj kaj potencoj aŭtomate sekvantaj ilian ekigon. Dum tiu legado oni kompreneble devas meti flanken ĉian kultan garnajon, malgravan kompare al la esenca enhavo, kaj krome ne lasu sin erarigi per tio, ke la supre priskribita efikado de spiritaj leĝoj estas interpretita kiel sekvo de diaj afektoj kaj preferado. Eble la aŭtoroj mem ankoraŭ kredis je tiu interpreto, sed pli probable estas, ke ili opiniis tion necesa por eviti la riskon, ke la nevalita scio pri la priskribita laŭleĝeco finfine povus faligi la popolon en konfuzan ateismon, ĉar la homo de tiu tempo povis veni al sia imago pri Dio nur per sia *memprojekcio* en revon pri plenpotenca *arbitro*.

Ekzistas *multo*, kiu hodiaŭ, post jarcentojn longa uzado favore al antaŭjuĝeca kredopinio, estas tute perdinta sian propran, veran vizaĝon, kaj nur la plej akraj okuloj kapablas ekkoni la originajn trajtojn, el kiuj oni eventuale povas ankoraŭ legi tion, kio iam estis klara, nemiskomprenebla kaj akre konturita.

Se miaj vortoj eble instigas vin ekzerci viajn okulojn, por ekkoni en la antikvaj sciigoj tiujn spurojn malklariĝintajn per ŝlifado kaj viŝado kaj lerni ĝuste interpreti ilin, ne malmultaj ĝojoj de eltrovado atendas vin.

Beno el la eterna pralumo estu sendata al vi ĉiutempe!

## Dekdua letero

Ke ankaŭ vi sentas pri tio, kion mi diras pri la „animoelementoj“ en la ĉapitro „Pri la morto“ kaj en aliaj lokoj, ke devas esti „tute, nedireble malfacile“ „unuigi“ al si tiujn animerojn, ne estis neatendite por mi. Neniu alia loko en miaj libroj alportis al mi en la fluo de la tempo tian kvanton da demandoj kaj petoj pri ekspliko.

Sed la tuta timo antaŭ la malfacileco – sendube *reala* – de la tasko ekzistanta rilate la animeroj, ree kaj ree montriĝas kiel sekvo de malĝusta imago pri la naturo de tiuj elementoj. La samo aplikiĝas al vi.

Pro la multaj informpetoj, mi refoje travidis, kun la plej granda memkritiko rilate la esprimmaniero de mi uzita, ĉion, kion mi devis prezenti en diversaj lokoj pri la postulita unuigo de la animeroj. Sed malgraŭ mia plej bona volo atribui *al mi* la kulpon pri la estiĝinta erara imago, mi ne povis trovi iun vorton, kiun mi estus volinta ŝanĝi.

Certe, mi devis atentigi en miaj eksplikoj, ke konsiderinda grado de memdisciplino estas necesa por fari la unuigon de la animeroj en la propra mio. Sed kvankam mi diris en la loko konata al vi, ke estas pli facile „konduki furiozan elefanton per maldika kanaba ŝnuro tra foira homamaso, ol unuigi la *multajn* volojn de la animo-elementoj, kiuj konsistigas la homan „animon“, sub la *unu*

volo de *tiu ĉi homo*“, – kie mi volonte uzis bildon, kiun mia iama anima instruanto ofte uzis en niaj interparoloj kaj kiun li opiniis senpere ilustra, – mi ja montris ĝuste en tiu loko, ke tiu „miraklo“ *tamen* povas okazi, kaj *devas* okazi, se animo volas esti preparita por povi ricevi en si sian vivantan Dion.

Tio estas *malfacila*, sed *ne neebla*!

Por ĉiu normale sentanta, eĉ se nur relative primitive edukita homo, estas *eble* superi la malfacilaĵojn de tiu unuigo de la animeroj en sia volo, – sed por tiu aŭ alia sendube alte erudita homo, kiu ĝojas pro sia ĉiuflanka edukiteco, bedaŭrinde estas *ne eble* disvolvi en si la *energion* kaj *persistemon* nepre necesaj por tiu unuigo...

Ne forgesu, ke mi ja vere ne instruas „metodon“, – sed ke temas en mia tuta skriba verkaro pri sobraj instrulibroĵoj, kiuj montras kaj komprenebligas al anime serĉantaj homoj *la strukturon de la eterna spirita vivo*. Tiucele mi devis pritrakti *ĉion*, kio ene de tiu ĉi spirita-substanca vivo fariĝis ebla al teraj homoj kaj sekve estos ĉiutempe ebla. Sed ne ĉiu afero estas ebla al *ĉiu*! Sed ĉiu povas esplori sin pere de miaj instruaj tekstoj por eltrovi, kio estas ebla al li. Certe gravas en tiu esploro ankaŭ psikofizikaj, denaskaj kapablecoj, sed antaŭ ĉio *energio* kaj *persistemo* decidis pri la ebloj rezervitaj al homo serĉanta tion sian eternan tie ĉi dum sia tera vivo. Kiel oni povas fariĝi tre sukcesa komercisto, kvankam oni nature *ne* havis apartan kapablon por kalkulado, tiel same oni povas veni al tre ampleksa spertado de tio eterna en sia animo, se oni energie kaj

persiste restas sur la vojo al la celo, eĉ se neniam denaska taŭgeco faciligas la progresadon sur tiu vojo. Sed oni devos aranĝi sian *tutan* – internan kaj eksteran – vivon konforme al tiu strebado. En tio, estas plej grava la maniero, kiel kaj kie oni serĉas siajn *ĝojojn*, ĉar nenio retroagas tiom intense sur ies animo, kiel la karaktero de la aferoj, okupiĝoj kaj okazaĵoj, kiuj kaŭzas ĝojon al li.

Sed nun finfine ankaŭ iom pri la komence menciita malĝusta imago pri la naturo de la animeroj.

En la fluo de la tempo mi rimarkis strangan samformecon en la interpretado de tiu vorto. Ree kaj ree mi renkontis la opinion, ke animoelementoj estas io simila al niaj korpaj „sensoj“ kaj estas distingeblaj tiom facile kaj nemiskompreneble kiel la vidsenso disde la aŭdsenso aŭ flarsenso. Sed tio neniel konformas kun la faktoj. Oni ja povas diri, ke niaj ecoj estas kaŭzigitaj de niaj animeroj, – do la specoj de nia sentado pere de la sensoj, kaj la preteco reagi de tiuj sensoj, – sed oni bedaŭrinde ne povas tiom klare apartigi la animerojn unu de la alia, kiel la sensojn. Pli bone oni povus kompari la animerojn kun la *nervoj* de la tera korpo, eĉ kun la tuta nerva sistemo, ĉar kiel ĉiu nervo havas sian difinitan funkcion kaj tamen estas kunordigita kun miriado da aliaj nervoj, tiel ke estiĝas plej diversaj interagadoj, tiel same ĉiu el la animeroj – kvankam ni ne povas nomi ilin per difinitaj individuaj nomoj – havas sian spirite difinitan funkcion por plenumi kaj troviĝas en konstanta interagado kun ĉiuj aliaj animeroj, kiuj konsistigas la animon, kaj en certaj apartaj cirkonstancoj

agaz eĉ tre foren trans la regionon de la animo entenanta ĝin.

Sed la unuigo de la animeroj en *unu volo*, ordonanta al ili ĉiuj, estus afero tute ne realigebla, se estus postulita kiel necesa kondiĉo por tio, ke ĉiu individua animero estu ekzakte nocie *difinita*. Feliĉe, tio nia eterna *neniam* faras neplenumebajn postulojn, kaj ĝuste ĉi tie eĉ la plej ekzakta kono de la aparta karaktero de ĉiu unuopa animero *ne kondukus al la plej malgranda dezirita rezulto*, ĉar la *unuigo* de la animeroj estas sole nur afero de la *volo*, kiu donas al ili ĉiuj, sen escepto, la direkton de efikado per *sia propra* klara difiniteco.

Tio malfacila estas: – tenadi la volon mem *konstante kaj seninterrompe* en la sama direkto, de kiu ĝi *ne* devas konscie devii dum *eĉ nur unu sekundo*, kio ajn en la ekstera mondo povus tenti ĝin al tio.

Jen tio plej malfacila, kio devas esti superata sur la vojo al Dio, sed oni *povas* superi ĉi tion, kaj sennombraj homoj en la fluo de la terhoma historio sukcesis en tio. Identita kun tiu ĉi tasko estas la *formado* de tio propra eterna de l' homo; pri tiu formado mi skribis en pli frua letero, ke la tera korpo estas metiejo por ĝi... Oni devas lerni rigardi tiajn aferojn el diversaj perspektivoj, se tio reala, kiu tie ĉi serĉas prezentiĝon en vortoj, estu ekkonata.

Mi esperas, ke tiu ĉi letero alportos al vi trankviligon kaj forigos vian zorgon, ke estas postulate de vi pli ol estos eble al vi per viaj propraj fortoj. Vi ja ankoraŭ estas „en via

metiejo“ kaj kapabla, per la iloj prezentitaj en ĝi, *mem* difini vian eternan formon. Post kiam vi forlasis tiun ĉi teran korpon, ĉesas ĉiu plua influo farebla de vi mem sur via eterna formo. Sed ni esperu, ke ĝis tiam vi jam *formis* vin tiel, kiel vi *volas* esti formita!

Estu benata el eterna lumo!

## Dektria letero

Kiam Goethe, post la apero de la sceneja adaptaĵo de sia „Götz“, ricevis de amika flanko la bonintencan proponon, ke li sendu tiun adaptaĵon al pli aĝa, nobela konatulo sia, kiu jam estis espriminta sian grandan ĝojon pri la origina versio de la dramo, kaj – laŭ Goethe – „volonte metis sin kvazaŭ en la personon de la maljuna brava heroo“, la poeto decide rifuzis tiun deziron, argumentante, ke la admiranto de la unua versio „certe ne ŝatus vidi, ke nun kelkaj partoj mankas aŭ estas translokitaj, modifitaj aŭ eĉ traktitaj en tute alia senco“.

Mi rememoris tiun rifuzon, faritan surbaze de ĝusta, psikologie difinita antaŭvido, kiam mi nun estis leginta vian leteron tiom karan al mi. Mi ne sciis, ke unue enmaniĝis al vi la *pli fruaj* eldonoj de la diversaj libroj poste pliampleksigitaj kaj samtempe aparte reviziitaj de mi, tiel ke vi nur *nun* aŭdis pri la *definitivaj* eldonoj de tiuj instruaj tekstoj laste estiĝintaj. Sed estas bone kunsenteble,

ke vi estis „tiom kutimiĝinta al kelkaj detaloj de la malnovaj versioj“, ke vi „malgraŭ ĉiu konsento kun la nun tiom pli klara nova versio“ vi iom sopire rememoras ilin. Ankaŭ al mi la unua versio estis kara, alie mi neniam estus publikiginta ĝin, kvankam la aminda kaj vigla estro de la granda eldonejo, kiu tiutempe aperigis la unuajn versiojn, kvazaŭ tiris la manuskriptojn el miaj manoj, tiel ke pleje restis al mi tre malmulta tempo por la lasta kontrolo. (Ĉe unu el la libroj eĉ okazis la strangaĵo, ke la poŝto alportis al mi *la presitan kaj binditan libron*, dum mi apenaŭ atendis la unuan presprovaĵon por korektado!)

Rezigni la antaŭan version estis ĉiukaze malfacile por mi, jam sole pro tio, ke ĝi, same kiel tio restanta neŝanĝita, estis la rezulto el la fidela sekvado de spiritaj leĝoj pri sonvaloroj. Kie mi tamen refandis la malnovan version favore al la nun ekzistanta, tie tre gravaj kaŭzoj estis decidaj. Aparte de multaj krudaj preseraroj – neeviteblaj pro la menciita hasta praktiko rilate miajn manuskriptojn, kaj kelkfoje tute inversigantaj la sencon de plej gravaj lokoj de la teksto – devis esti forigataj kelkaj detaloj de mia lingvaĵo, kiuj certe estis influitaj de la dialekto de mia hejmlingvo, sed povis esti ĝenaj en instrulibro pri spiritaj aferoj. Krome, en interŝanĝoj de leteroj kaj en interparoladoj mi rimarkis, ke estis dezirinde, aŭ eĉ necese, ke kelkaj tekstlokoj estu modifataj por certigi ĝustan *komprenon*.

Ke tia modifado de libro jam alirebla al la publiko estas tre *sendanka* afero, mi vere sciis, sed tio ne devis deteni min fari tion necesan.

Sed mi surprize kaj ĝoje spertis, ke mi ricevis grandan nombron da dankleteroj, kiuj ĉiam denove montris, kiom vive kaj preskaŭ entuziasme la legantoj de tiuj libroj *salutis* ties novan formon. Ĉar mi antaŭe estis bone konsiderinta, ke estos malfacile por la leganto kutimiĝi al versio unue ŝajnanta strange diferenca, tiu aprobo estis por mi tute neatendita. Via iom elega tristeco pri certaj teksteroj modifitaj de mi estas preskaŭ unika, ĉar mi ricevis nur unu solan similan reagon, kaj tiu venis de amiko, kies patrina lingvo *ne* estis la germana, kaj al kiu mi per la reviziado certe ne faris servon, ĉar li nun renkontis vortojn, kiuj tion, kion li antaŭe estis enpreninta en aliaj vortoj, unue evidente *ĝenis*.

Sed mi esperas, ke vi tamen tenos vin nur je la novaj versioj de la koncernaj libroj kaj tiam ekkonas pli kaj pli klare, ke tiuj revizioj *devis* esti farataj, kaj certe ne rezultis el estetika kaprico aŭ el la neceseco de represo. Instruaj libroj tiaj, kiajn mi skribas, oni vere ne ŝanĝas, se la propra respondeco kontraŭ la uzantoj de tiuj libroj ne *rigore* postulas ŝanĝadon! Plibono ĉiam estas malamiko de bono. Sed tio ne forlogu nin al tio, ke pro la bono ni lasu *nefarita* la plibonon.

La ĉielo benu vin!

## Dekkvara letero

Se venis al vi la ideo, ke eble kelkaj imagoj, kiuj estis vivaj en la antikvaj politeismaj religioj, sed ankaŭ la sanktulaj kultoj troveblaj en aziaj religioformoj kaj fine en la bizanca kaj romia kristanismoj, „ricevas nediskuteblan pravigon“ per la ekzisto de la lumantoj de la pralumo, vi certe estas sur la spuroj de la vero.

Sed por protekti tiun ĉi mian konsenton kontraŭ eventuala misinterpreto, mi tie ĉi devas tuj diri, ke vi treege erarus, se vi supozus, ke ĉiuj figuroj de adorado konataj el la antikvaj religioj kaj el la diversaj sanktulaj kultoj, – figuroj formitaj de legendo kaj devoteco kaj kreditaj de pia imagado, – povas esti atribuitaj *al specifaj membroj* de l' spirita komuneco de la lumantoj de l' pralumo, aŭ ke la kanonizoj faritaj de la romia eklezio eble okazis en pli frua tempo *surbaze de sekreta kono* de tiaj koneksoj.

Ke inter tiuj figuroj troviĝas ankaŭ *virinaj*, dum lumanto de la pralumo *povas* manifestiĝi *nur* en vira tera korpo, *ne* estas argumento kontraŭ via supozo, ĉar ĉiu lumanto, malgraŭ klare elformiĝinta vireco de lia tera, putrema korpo, servanta al li por la mallonga vivdaŭro sur tiu ĉi tero, tamen *spirite* estas nedisigeble *unuigita* kun „tio eterne virina“, kaj tial lia figuro povus *doni esprimon* kaj al tio spirite vira, kaj al tio spirite virina.

En la imagaro de antikvaj politeismaj religioj, kiel ankaŭ en la sfero de la diversaj sanktulaj kultoj, certe ekzistas figuroj, kies originon oni povus atribui al lumantoj de la pralumo sen subfali al eraro, kvankam ili portas la hieratikan distingon de kanonizado. Sed, eĉ se oni povus elmontri tian „devenon“ per la plej bonaj pruvoj, oni tamen estus sufiĉe malproksima de la ekkono, kiun indikas via supozo: – nome ke *ĉiu* alvoko direktita al *iu ajn* figuro estiĝinta el legendo kaj adoradbezono, indiferente, ĉu ĝi estas rigardata kiel pure ĉiela aŭ kiel iama tera homo, estas *respondata* fare de la helpantaj spirita forto kaj benopreteco de la lumantoj de la pralumo, kiel la sola realo tie ĉi koncernata.

Kiel la kredanto *nomas* la figuron alvokitan de li por doni helpon, kaj kiel la helposerĉanto eble *eksplikas al si* ties kapablon por helpi, restas tute indiferenta por la procezo *reale* okazanta. Tiu ĉi procezo nur tre malmulte diferencas de la helpa ago vekanta tion eternan de la anime serĉantaj homoj, kaj gvidanta ties animojn, kiun mi antaŭ iom da tempo prezentis al vi, menciante la metaforon de ŝalttabulo kun grandega nombro da elektrodoj, kaj tiu diferenco estas kondiĉita nur de la *enprenkapablo* kaj la *imagaro* de la alvokantoj.

Sed oni ne devas malatenti, ke, en la anima situacio kaj eĉ la donita grado de enprenkapablo de tiuj ĉi alvokantoj, ekzistas por multaj, se ne por ĉiuj, *eblo intense pliprofundigi* sian alvokon, se ili povas doni al la figuro adorata de ili trajtojn tiom konkretajn kiom eble en sia imago. Kiam oni diras ekzemple pri la granda sanktulo de

Padovo, kiun la popolo estis „kanonizinta“ longe antaŭ ol tiu honoro estis postmorte farata al li de la papo:

„Pri kio vi petas, tion donas al vi  
Antonio, riĉa je mirakloj.  
Mizero, lepro, nokto de eraro,  
La infero mem, cedas al lia potenco !  
Li kvietigas la furiozan maron,  
Li alportas ion perditan!  
Firma kateno rompiĝas,  
Malsana membro sendoloriĝas!  
Kiu lin alvokas, aĝa aŭ juna,  
Sentas per li konsolon kaj dolormildigon“

– tiam tie ĉi prezentiĝas tipa ekzemplo por tio, kiom plifortige kaj fidon progresige retroagas sur la alvokanto la imagado de konkreta tera persono ĝenerale konata al sia adorantaro. (Vi eble scias, ke la padova sanktulo estis potenca, fascina *predikisto*, – portugala monaĥo, kiu post multaj predikveturoj mortis en Padovo, sed havas nenian rilaton al la multe pli frua Antonio *la ermito*, kun kiu Wilhelm Busch, al kiu la aferoj pri sanktuloj ne estis tre bone konataj, konfuzis lin en sia satiro.)

Gravas por la alvokanto, ke li post sia alvoko *sentas* „konsolon kaj dolormildigon“, kaj se lia alvoko *sen* konkreta, laŭkrede historia modelo por la imago ne estigus la postulitan forton, kiu povas fari ĝin „perceptebla“ al tiuj reale helpantaj, tiam oni vole-nevole devas rigardi la uzon de tia imagada ‚lamulbastono‘ kiel ekskuzon favore al li.

Pri io tre simila temas ĉe la *loke* kaj *tempe* estiĝintaj *modifaĵoj* de iu figuro de adorado. Apolono, Afrodito, Artemiso kaj kelkaj aliaj „dioj“ de la antikva mondo, imagitaj en tre plastike formitaj figuroj, estis adorataj en diversaj lokoj en ne malpli diversaj interpretoj, same kiel ankoraŭ hodiaŭ la „Dipatrino“, vidata en ŝiaj sennombraj lokoj de adorado el *ĉiufoje alia* starpunkto, ekflamigas tre diversspecan fidon de la kredantoj. Tute ne estas tiom ridinde, kiel opinias rigardmaniero orgojla, sed juĝanta nur la eksterajon kaj la surfacon, kiam ĝi rimarkas, ke alvokantoj kun siaj *diversaj petoj kaj deziroj* pilgrimas al *diversaj adoradlokoj* de la Madono. Tie ĉi temas ne pri „idolserva“ plumpa multobligado de la amata figuro de adorado, al kiu oni donis abundon da fido, – figuro, kiu iam elkreskis el la sublima kulto de la „*Hagia sophia*“, la „Dia Saĝo“, kiel esenco de tio „eterna virina“, kaj poste estis identigata kun la patrino de Jesuo, – sed pri tre diferencigita sentado de *lokaj, bildaj kaj legendaj* influoj sur la plej granda intenseco de alvoko atingebla.

Sed tiu ĉi *intenseco* estas *esence* grava, se la alvoko estu „perceptata“ de tiuj en la eterna substanca spirito, kiuj tie ĉi havas la taskon direkti la fortojn de spirita helpo. Ili respondas alvokojn, kiujn direktas pia budhisto de l’ „Granda Vehiklo“ al unu el *siaj* figuroj de adorado kaj kiuj atingas ilin kun sufiĉa resonanco, *tute same* per helpo en la grado ebla laŭ spirita leĝo, kiel ĉiun alvokon, kiu atingas ilin el regionoj de *aliaj* religiaj imagoj.

Mi urĝe petas vin, ke vi plene alproprigu al vi tiujn ĉi sciigojn hodiaŭ donitajn. Per via *propria* kapableco vi tiam malfermos al vi multe pli ...

Estu benata el eterna lumo!

## Dekkvina letero

Ne je la unua fojo oni skribas al mi, ke, per la de mi diskonigitaj instruoj *per si mem*, multo, kiu antaŭe elvokis malfacilajn demandojn, subite fariĝas klara kaj komprenebla, aŭ, por uzi viajn vortojn, ke „ĉio ricevas novan aspekton“.

Sed tio ne estas miriga, ĉar mi ne rakontas ion, kion mi pli-malpli frivole elpensis al mi aŭ trovis dum profunda pensado, sed raportas pri la donita strukturo de la vivo en la eterna spirito, ĉar ĝi estas konata al mi el *propria* luma spertado, kaj pli konata ol ĉio, kun kio mi iam konatiĝis ekster ĝi. Sed ĉar *ĉia* vivo *originas* el la eterna, substanca spirito, kaj la terhoma cerbokonscio, malgraŭ ĉiu animalnatura mallumo destinita por ĝi, tamen daŭre *ricevas* influojn el la eterna substanca spirito, indiferente ĉu ĝi povas ekkapti ilin aŭ estas tro inertia por tio, – *la nura priskribado* de la strukturo de la eterna spiritovivo povas konduki al la unua vekiĝo, post kiu oni rigardos la mondon iom aliamaniere ol antaŭe.

Ĉu homo rezulte jam havas ĉion, kion li antaŭe deziris por sia animo, aŭ ĉu li nun sentas sin des pli forte instigita progresi en la *pliajn* gradojn de vekigo montritajn de mi, tio certe dependos *de li sola*, – sed *ne* ĉie dependas de li *la teraj antaŭkondiĉoj* por tiu decido.

Multaj homoj eble havas multon da bona volo pli kaj pli vekigi anime, sed ne la *forton* forigi el sia vojo ĉiujn terajn obstaklojn, kiuj nebligas pli luman vekigon. En kelkaj el ili tiu forto ja ekzistas, sed samtempe ankaŭ la ekkono, ke oni ne devas komenci forigi ekzistantajn obstaklojn, ĉar per tio oni *rompus* surprenitan *devon*. Sed ĉar la tasko de la homo surtere ne estas: subite lasi nefarita ĉion, kion li kapablas bone plenumi kaj konduki al almenaŭ relativa perfekteco, por tiam vivi nur pro sia ekkonado. Se li volus agi tiel, li certe igus sin perdi la frukton de sia penado. Tial la serĉanto sin progresigas, se *sufiĉas* al li tio, kion lia tera situacio *donas* al li. Ĉiu plia postulado, transe de tio, kion permesas la eksteraj cirkonstancoj, estas *vana* kaj povas ege endanĝerigi tion, kio tute certe estus *atingebla* kaj *povus* pligrandigi la spiritan posedaĵon.

Estas simile al tio, kio okazas en ĉiutagaj *teraj aferoj*: – Kiu postulas tromulton, atingas *nenion!* Oni ne volu progresi al algebraj problemoj kaj al integrala kalkulo, se oni ankoraŭ ne posedas la elementan aritmetikon.

Sed la serĉantoj ankaŭ faras al si multe tro *fantaziajn* imagojn pri tio, pri kio ili kredas ke ĝi estas atingebla al ili en la spirito, kaj neniu instruo povas deteni ilin de tio, ke ili serĉas, anstataŭ la spertado *de spirita vivo*, la plej strangajn

sensaciojn kaj plivastigojn en la *terkorpa* spertado, kiu kune kun sia tuta enhavo iam trovos sian certan *finon*. Ekzaltita troigado de valoraj sentoj – kiuj propre pliriĉigas la enhavon de la animo kaj ankaŭ estas tre *sanigaj* por la korpo, – ĝis plej dubinda *ekscito de la nervoj* jam signifas al la plej multaj „spiritan sperton“. Multaj ankoraŭ opinias, ke estas necesa kaj tial plej alstrebinda celo, pli kaj pli „spiritigi“ la korpon, kio kompreneble devas konduki ilin de unu memtrompo al alia. La spiritleĝe postulitan *enkorpiĝon de la spirito* nur la plej malmultaj atingas: – sole tiuj, kiuj volas *tion realan*, sed ne sensaciojn.

Homo de scio ne facile  
Povas kompreni surtere:  
Ke ĉia eterna spertado  
Estas *mem* al si *enhavo*, –  
Ke la spertanto en l’eterno  
Ne spertas „aliaĵon“,  
Kiu – kiel en *tera* spertado –  
Proksimiĝus al li *per* lia sperto.

En tio eterna,  
*Tera* spertmaniero restas  
*Ŝajno* kaj *ŝaŭmo* ...  
Nur spertado *sin mem* malfermanta  
Malfermas „spacon“ *generitan de la eterneco!*

\*

Se Paŭlo, la tendofaristo el Tarso, – tiu plej granda *homo de fortego* (komprenebla al hodiaŭaj homoj nur kun retenema respekto kreanta plej grandan distancon) inter tiuj unuaj malgrandazianoj, kiujn la instruo de Jesuo kondukis al ili mem kaj al propra spertado, – kuraĝas eldiri: „Tion, kion *okulo* ne vidis kaj *orelo* ne aŭdis, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas“ – li per tio parafraze priskribis plej klare ĉiun *realan* spiritan spertadon. Tiun parolon de scianto oni interpretis efektive *kontraŭsence*, donante al ĝi la malsaĝan sencon, kvazaŭ tio rezervita al la amantoj de Dio estas vera ĝuego por la sensoj, tia, kia multe superas ĉion kompareblan, surtere sperteblan. – Sed:

–

En la lumo, ekkono kaj tio ekkonata  
Estas *unuigitaj* al la ekkonanto,  
Kaj kio surtere ŝajnas disigita,  
Nun ne plu estas disa  
En spaco kaj tempo,  
Ĉar ĉio estas *samtempa*  
Kaj *samloka*,  
En la eterneco ...

Kiel tiuj aferoj sekrete okazas,  
Neniu lingvo povas komprenebligi,  
Ĉar *vortoj* neniam povas heligi tion,  
Kio iĝas spertebla nur kiel luma *vivo!*

\*

Mi apenaŭ bezonas diri al vi, ke estus mia, terhome rigardate, plej arda deziro, trovi vin ankoraŭ dum via

surtera vivo samtempe en tiu luma vivo de la eterna spirito. Mia ĉiam benanta helpo estos konstante proksima al via strebado!

## Deksesa letero

Ke la mencio, en mia lasta letero, de la apostolo Paŭlo – kiu, kiel vi scias el mia libro „La Sekreto“, estis alprenita, spirite antaŭdestinita disĉiplo de la lumantoj de l’ pralumo, kiu fine estis trovinta la vojon al la vera instruo de Jesuo – povus nun fariĝi kaŭzo por pensado pri lia „konvertiĝo“ okazinta laŭdire sen preparado, mi ne supozis, ĉar mi ja kredis, ke mi estis montrinta en la menciita libro sufiĉe klare, kiel la tuta rakonto pri Damasko devas esti interpretata kiel simbolo de multe malpli efektoplena okazado, se oni volas elŝeligi la veran kernon en ĝi entenitan.

Mi devas peti vin legi tion diritan en tiu libro, se mi ne kopiu ĝin tie ĉi. Sed por eviti ĉiun miskomprenon de miaj vortoj tie donitaj, estu klare dirate, ke la ŝanĝiĝo, ŝajne okazinta tiom subite, de la fanatika malamiko de la instruo de Jesuo en ĝian plej grandan ekzegeziston, estas vekiĝo longe trabatalita el plej profunda amo al la vero kaj kun preskaŭ superhoma forto, kaj fine atingita *kontinue, iom post iom*. Tiu ĉi vekiĝo tiam devis rezultigi rezolutan strebadon al recompencado de tio, pri kio Paŭlo antaŭe – kvankam bonafide – estis kulpiĝinta.

Kiam iu raportas al vi pri vekiĝoj okazintaj *tute subite*, aŭ kiam vi renkontas similaĵon en malnovaj rakontoj, estas ĉiam konsilinde fariĝi singarda kaj demandi sin, ĉu temas fakte pri spertado de *spirita realo*, aŭ pri *io tre tera*, kiel ekzemple ĉe la multflanke erudita Swedenborg, kiu ŝatis bonan kaj multan manĝon, kaj al kiu dum manĝado subite aperis viro sidanta sur la planko, kiu vokis al li: „Ne manĝu tiom multe!“ kaj tiam dissolviĝis en nebulo kaj nenio, sed bedaŭrinde estis „vekinta“ la latentan „*mediuman*“ *dispozicion* de Swedenborg, kiu dispozicio tiam devis servi al li por produkti la plej strangajn „ĉielajn“ ekkonojn miksitaĵojn kun konfuzaj scienceroj, kaj por havi tre ampleksan laŭdiran „interrilaton kun spiritoj“.

La *vera* vekiĝo al konsciiĝo en la eterna substanca spirito *neniam* okazas *ektimigante*, sed ĉiam *en la sinsekvo* de *laŭvicaj* gradoj de vekiĝo. Ĉiu grado devas rezulti el la antaŭa. Se iam – eble kaŭze de ekcesa laborado aŭ de alia troŝarĝo de via nervaro – trafas vin okazaĵo, kiu povus vin igi interpreti ĝin kiel „subitan vekiĝon“, tiam tre baldaŭ iru al *kuracisto* kaj se eble al unu, kiu estas sperta pri *cerebraj* aferoj, sed ne okupiĝas pri scienca hobbio en tiu fako!

La plej bona sekurigo kontraŭ tia cerba tumulto, kiu tute ne estas sendanĝera kaj povas konduki al la plej bela *skizofrenio*, estas la trankvila neallasado de ĉia *malpacienco* rilate la atingon de la kapablo sperti ion spiritan. Se vi sekvas tion, kio estas donita en miaj instrulibrooj kiel *ĝeneralaj* instrukcioj, kaj krome tenas vin je tio, kio aperas al vi kiel skribita „aparte“ por vi, tiam via

iom-post-ioma vekigo estos gvidata el centra ejo, kaj okazos tute tiel, kiel estas plej bone por vi.

Iru do en tuta trankvilo plue sur la vojo, kiun vi komencis en tiom gjojiga maniero! Vi estas sur bone markita pado sekure kondukanta al la celo, kaj vere konas per miaj skriboj la vojomarkojn, kiujn vi mem havas por atenti. Sed lasu tute al la decido de via interna spirita gvidanto, – pri kies agomaniero vi nun estas bone instruita –, kio povas esti montrata al vi jam *dum* vi antaŭeniras estante certa pri la celo, kaj kion vi povas atendi nur *pli malfrue*! Kaj ne forgesu, ke sur via vojo temas ne pri akirado de iuj novaj sciaĵoj, sed pri *fariĝado*, kiu en multaj aferoj de la ĉiutaga vivo certe kondukas al *aliiĝo*, iom post iom pli kaj pli sentebla, sed ĝuste per tio transformas vin tiumaniere, ke vi fine iĝas *kapabla* sperti tion vian eternan konscie kaj kun certeco.

Ĉiu alta helpo estu kun vi!

## Deksepa letero

Jakob Böhme vere ne estis nur „la ŝuisto de Görlitz“, kiel homoj de pli ol nur dubinda gusto ŝatas nomi lin. Li ankaŭ ne estis nur „ŝufaristo, kaj aldone *poeto*“. Ĉiuj ĉi banalaj aludoj pri lia pandona metio, kiu certe ne premisis la akiron de pli alta scio, estas neallaseblaj. Kion mi en la malgranda kolekto de unuopaj, memstaraj traktaĵoj,

publikigita de mi sub la titolo „Vojomontriloj“, diris pri Jakob Böhme, tio estas, kiel vi korekte komprenis, atentigo pri tio, ke li estis alprenita, spirite vokita *disciplo de la lumantoj de la pralumo*. Tiu ĉi fakto estis por li mem io tiom sankta, ke li sciis meti nubon de sekreteco sur ĝi. Kiom ajn multe oni skribis pri Böhme, neniu kapablis adekvate prijuĝi tiun spiritan interrilaton. Oni devas konfesi, ke Jakob Böhme prezentis siajn spiritajn spertojn kaj ekkonojn en tiom stranga kaj siaspeca formo – formo, kiu fariĝis ankoraŭ pli stranga per la malĝusta uzado de la latinaj kaj latinigitaj vortoj konatigitaj al li de liaj eruditaj amikoj, – ke oni devas mem tre precize scii pri tia spertado por ekkoni, kion li intencis priskribi.

Sed *alia* estas la afero pri la germanaj *mistikuloj*, kiel la laŭnome nekonata Frankfurta aŭtoro de la „Theologia deutsch“, kaj Tauler, Seuse, Majstro Eckhart.

Tiuj estis altgrade eruditaj viroj, kiuj sur malmolaj *filozofiaj* vojoj venis al siaj ekkonoj, kiuj nur malfacile povis gardi ilin kontraŭ eklezia anatemo.

En kontraŭa situacio estis la erudita poeto Johann Scheffler (Angelus Silesius), kiu, unue protestanto, fine savis sin en la katolikismon per tio, ke li transinterpretis ĉiun katolikan instruon en poetikan simbolon.

Fenomeno rigardenda, por mia sentado, kiel tute unika estas la plejprofundasence „pia“ kanoniko Thomas à Kempis, kiu skribis la kvar librojn pri la Imitado de Kristo,

kiuj estas plenaj de trankviliga bonkoreco, sed ja intencitaj kiel tute katolikaj.

Sed ĉiuj ĉi viroj tute ne staris en konscia rilato kun la lumantoj de la pralumo, kvankam ĉe ĉiuj el ili troviĝas eldiroj, kiuj povus tenti onin supozi, ke almenaŭ la kaŝita *ekzisto* de la lumantoj de la pralumo estis suspektata en la rondoj de mezepokaj germanaj mistikuloj.

Sed ke tiuj ĉi *ricevis*, nesciante, spiritan helpon kaj gvidadon fare de la eble suspektita fonto, rezultas jam sole el tio, kion mi iam antaŭe sciigis al vi pri la naturo de tiu ĉi spirita helpo, sed ankaŭ klare montriĝas el la predikoj kaj skriboj de Tauler, Seuse kaj Majstro Eckhart, tuj kiam oni zorge deprenas la ofte apenaŭ konvenan eklezian vestaĵon de sur la ŝultroj de certaj konfesoj kaj instruvortoj, sur kiuj ili estis metitaj, por protekti la koncernajn instruantojn kontraŭ la ŝtiparo. Ankaŭ ĉe Thomas à Kempis kaj ĉe Angelus Silesius, rigardenda antaŭ ĉio kiel mistike sentanta *poeto*, vidiĝas en multaj lokoj la spirita influo de la lumantoj de la pralumo.

Malgraŭ ĉia adoro mia por tiuj malnovaj germanaj mistikaj teologoj kaj filozofoj, – malgraŭ ĉia amo, kiun mi montras al la kvieta kaj subtila Thomas à Kempis, kaj malgraŭ ĉia ĝojo pri la brile konciza, kelkfoje ankaŭ batalema Angelus Silesius, mi tamen devas konsili al vi, en tiu ĉi stadio prokrasti la studadon de iuj mistikaj skriboj tiom longe, ĝis vi sentas, ke vi estas tiom certa pri via propra vojo, ke okaza irado sur flankaj vojoj ne plu povas konfuzi vin pri la direkto al via celo.

Sed tiu ĉi konsilo gardu vin nur kontraŭ tro longaj *haltoj* sur via vojo, ĉar dum la tempo, kiun vi bezonus por formi al vi juĝon, kiu pli malfrue doniĝus al vi *tute spontanee*, vi povus jam esti proksimiĝinta al via celo je ne malgranda parto de l' vojo. Kaj ne forgesu, ke la skriboj de *ĉiuj* viroj menciitaj – kun la *sola* escepto de *Jakob Böhme* – prezentas *opiniojn*, kiuj en interna malmola luktado estis elpensitaj kaj kreditaj kaj kelkfoje konkretiĝintaj ĝis arda sentosperto, pri la mondoj de la eterna spirito, dume vi ĝuas la preskaŭ nekompreneblan feliĉon, ke vi estis dekomence kondukata sur la vojo en la eternan *realon* ...

Estu benata per ĉiu beno, kiu estas konfidita al mi kiel reala spirita forto direktebla per mia volo!

## Dekoka letero

Homoj, kiuj en siaj apartaj vivokampoj estas tiom „hejme“, ke ili plej profunde konas ĉion grandan kaj malgrandan, kion tiu ĉi kampo de ilia ankriĝo ampleksas, iam kaj iam subite rimarkas, ke ili aŭtomate supozas, ke la sama profunda kono ekzistas ankaŭ ĉe aliaj homoj, al kiuj tiu vivokampo estas aŭ tute fremda aŭ nova. Io tre simila okazas ankaŭ al mi, kiam mi devas prezenti en vortoj la aferojn de la eterneco: – la aferojn de la eterna substanca spirito. Ofte unue necesas ofte ripetita konsiderado kaj provado de la uzitaj vortoj laŭ ĉiu vidpunkto, ĝis fine mi

tamen rimarkas, ke iu frazo riskas esti misinterpretebla, aŭ ke esprimoj uzataj de mi *sinonime* povas nutri la opinionon, ke mi uzas ilin en *malsamaj* sencoj. Ĉar mi, per mia propra eterna vivo, estas en tute natura maniero *konscia* pri la strukturo de la vivo en la eterna spirito, estas eble, ke mia prezentaĵo aperis al mi nemisinterpretebla, ĝis unu tagon demando direktita al mi montris je mia ne malgranda teruro, ke oni tamen sukcesis miskompreni min.

Sed via demando, rilatanta al la nocio „Dio“ kaj entenata en via letero ĵus ricevita de mi, estas de alia speco. Dum mi alitempe, kiel mi supre diris, renkontis la inklinon interpreti vortojn, uzitajn de mi *sinonime*, kiel esprimojn por *diferencaj* nocioj, vi opinias, ke vortoj uzitaj de mi por *distingendaj* nocioj probable devas esti interpretataj kiel *sinonimoj*. Sed tie ĉi tio *ne* estas ĝusta, kvankam mi bone komprenas, kio kondukis vin al via opinio.

Tie ĉi temas pri aferoj ene de la strukturo de spirita vivo, kiuj estas apenaŭ kaptetablaj al la tera intelekto kaj estas preskaŭ ne nemiskomprenoble prezentetablaj; krome, eraroj estas vere vokataj per la konvencia dioimago cerbe konservita, kiu tuj estas rigardata kiel tio celita, eĉ se oni parolas en tre *diferenca* senco de „Dio“: ne kiel postulato de la kredo, sed kiel la plej interna memkonscio de la tuta eterna spirita realo. Mi volas, ke oni komprenu la vorton „Dio“ nur en tiu ĉi senco, kie ajn mi uzas ĝin. Oni tie ĉi ne pensu je *racia* memkonscio; sed tiu ĉi plej interna konscio, ĉiam denove estiganta sin el la eterna spirito, – tiu ĉi plej subluma memsuperlumigado elfluanta el la nemezurebla kosmo de *tio sola estanta* kaj plej interna esenco de la

eterna substanca spirito, – samtempe estas eterne aganta *volo* kaj neelĉerpebla *forto*, revelaciiganta sole en *mezuro* kaj *mildeco*, kaj motivata sole de *propra* imanenta leĝo.

Ne serĉu diecon en hororo de fundoj,  
Timigaj abismoj aŭ teruraj fendegoj!  
Ne serĉu Dion en laŭtega muĝado  
De ondofrapado, en tumulto de ŝtormoj!  
Ne serĉu Dion en fulmotondroj,  
Kiuj tremigas la rokojn de l' tero!  
Ne serĉu lin super mondoj kaj sunoj,  
Ne en ĝuado de senlimaj ĝojoj!

Se vi *en vi mem* lin volas trovi,  
*Timon* kaj *avidon* vi devas superi!  
Ne revu pri foraĵoj al vi neatingeblaj: –  
Dio pliproksimas al vi ol al ĉiuj steloj!

\*

Ĉio estas *en* Dio, kaj Dio *estas* en ĉio! *Primare* en siaj propraj radikosferoj: „Praesto“, „Pralumo“ kaj „Pravorto“, kiel en sia memformaĵo, la „Patro“, – *sekundare* en ĉiu nevidebla, kiel en ĉiu videbla vivo.

Sed tion oni ne devas kompreni tiumaniere, kvazaŭ mi predikas specon de „panteismo“, kaj mi same malmulte volas prezenti tion, kio estas Dio, kiel „personon“. Ankaŭ „Praesto“, „Pralumo“ kaj „Pravorto“ vere ne estas „personoj“, kiel ekzemple en la kristana dogmo de triunuo: Patro, Filo kaj Spirito. Kaj aliflanke tio, kio estas „la Patro“

por la lumantoj de la pralumo, *ne* devas esti interpretata *en la senco de tiu dogmo*.

Ni konas kaj instruas *la realon*, ne iun ajn kredinstruon!

Sed en la realo: en la strukturo de la spirita vivo, ekzistas monoteismo, kiu toleras ankaŭ politeismajn interpretojn, sen per tio povi esti metata en kontraŭecon al si mem.

La Dio de la realo ne estas, kiel estas dirite, „la plej alta estaĵo“. Tiu ĉi plej alta estaĵo estas la *Patro*, kiu elradias *sin mem* en la formojn de la dek du *Patroj*, kiuj estas *liaj agadaj aspektoj*. Sed Dio estas ne „estaĵo“, sed: – tie ĉi en aparta, *unika* senco, – la *esenco* en ĉio, kio estas *esence* reala. Tiel en la „Praesto“, „Pralumo“ kaj „Pravorto“. Tiel en la „Patro“ en *ĉiuj* liaj aspektoj.

Sed la *Patro* estas – „*Homo*“ en la Praesto, en la Pralumo, en la Pravorto: – la *Pra-Spiritohomo* eterne generanta sin mem, kaj la mezuro de ĉiuj aferoj ricevantaj formon el li, tial ankaŭ de tio eterna *en la tera homo*. –

Dio estas same absolutamaniere Dio en la „Patroj“: – la *formo de revelaciigo* de la *Patro* – kiel en la Praesto, Pralumo kaj Pravorto. Sed *por si mem*, tio, kio estas Dio, estas *nur en si mem* „Dio“: – la *esenco* per si mem, – sed „vidate“ el ĉio *alia*, estanta en li en la eterna substanco spirita vivo, Dio estas *esenco* de *ĉiu* estaĵo. – Kaj „estaĵo“ estas *realo* el „esenco“.

Sed mi tie ĉi prezentas ne ion „unu-apud-la-alia“ aŭ „unu-super-la-alia“, sed tion „unu-en-la-alia“ de la strukturo de la eterna spirita substanco vivo, kiom mi kapablas fari per vortoj de tera lingvo.

Oni ne diru, ke la prezentado de tio eterna reala estas *praktike senutila* por la homo sur tiu ĉi tero, ĉar li devas serĉi tie ĉi solvojn por tute aliaj problemoj, koncernantaj pli lian korpan ekziston. Sed neniu homo sur la tero povas trovi la internan kvieton kaj liberigon de sia animo, konscie aŭ nekonscie sopiratan de ĉiu, tiom longe, dum lia mensa imagaro ankoraŭ ne estas ordigita tute konforme kun la strukturo de la eterna spirita vivo.

Vi vidas, ke via demando certe ne riskis esti rigardata de mi, laŭ via opinio, kiel „malkonvena kaj superflua“, ĉar la plej malgranda imago, devianta de la realo, pri la strukturo de la eterna spirita vivo ne lasas veni vin al la kapablo enpreni ion spiritan, kiun kapablon vi ja volas akiri.

Restu en la beno de la lumo!

## Deknaŭa letero

Vi eraras, se vi kredas, ke mi fine povus fariĝi „malpacienca“, ĉar vi „jam refoje estas devigita fari demandon“. Mi tre bone povas kompreni, ke vi ĝis nun kutimis uzi la vorton „estaĵo“ aliamaniere, kaj tial maltrankviliĝas, kiam

vi vidas, ke la vortoj „estaĵo“ kaj „esenco“\*, uzataj de mi en aliaj lokoj sinonime, nun estis uzataj por signi *malsamajn* nociojn.

Certe, mi volas prezenti la aferojn, pri kiuj mi parolas, tiom *klarkonture* kion eble, sed ĝuste tie ĉi mi ne trovas alian eblon diri tion, kion mi volas diri, ol ke mi postulas, ke oni akceptu la vorton „esenco“ en la senco „tio *donanta* eston“. Sed la plej alta „estaĵo“ estas „estaĵo“ per tio, ke ĝi *estas en la „esenco“ kiel tiu ĉi estas en ĝi*, kaj se mi volas prezenti tion, kion mi devas prezenti, la du vortoj devas esti al mia dispono kiel terminoj. Ne aliamaniere, ol se mi devus klarigi al homo, kiu post cent jaroj releviĝus al tera vivo, ke elektra motoro moviĝas nur tiam, kiam ĝi estas konektita al elektro. Ankaŭ tie mi devus disponi la vortojn por *tio movata* kaj *tio movanta*. Sed tiu ĉi komparo multe lamas, ĉar al mi „esenco“ estas ne nur *tio movanta* de la estaĵo, sed antaŭ ĉio *la plejinterno de la estaĵo*, – aliavorte: ĝia viva „*kerno*“.

Sed estas malproksime de mi, tie ĉi fari ludon per vortoj, aŭ voli kvereli pri tio, kiu konvencia signifo estas permesate atribui al la vortoj tie ĉi preparolitaj. Mi estas tute preta koncedi al vi la rajton anstataŭigi la nomon de tio, kion mi nomas „esenco“, kiu sola *ebligas* „estaĵon“, per alia vorto, kiu parolas pli klare al vi.

„Esence“ estas nur, ke vi sentante ekkaptu tion, *kion mi celas*, ĉar tio celita estas tiom sublime fora de ĉiuj regionoj

---

\* en la germanlingva originalo: „Wesen“ kaj „Wesenheit“

de pensado, ke ĝi neniam povus esti elpensata, eĉ se oni volus doni al ĝi pensan formon per la plej klarkonturaj pensobildoj.

Tamen mi ne povas ŝpari al vi la penon lerni sentante ekkapti tion tie ĉi celitan de mi, se mi volas vidi vin protektita kontraŭ eraro rilate al tio, kion mi diras pri la „naskiĝo“ de *via* „vivanta Dio“ en via eterna homa animo, ĉar ĝuste tie ĉi temas pri nenio alia, ol pri la de mi celita „esenco“, pri kiu ankaŭ la individua tera homo povas fariĝi konscia en la formo plej ekzakte adekvata al lia individueco, kaj per kiu sola li kapablas fariĝi *esenca* en eterneco kaj tempo. –

La „*Patro*“ estas *konscie alirebla* nur al la *lumantoj de la pralumo*, kiuj prezentas lian propran generaĵon pere de lia formo de revelaciigo: – la dek du „patroj“ –, kaj al ĉiu unuopa lumanto en la formo de *tiu* el la dek du patroj (estantaj ĉiuj *identaj* kun la *Patro*), kiu „generis“ tiun ĉi individuan lumanton individue en la *Pravorto*. Sed la „*vivanta Dio*“, pri kiu mi parolas kiel pri la sola memrevelaciigo de Dio praktike atingebla por ĉiuj teraj homoj, povas fariĝi anime spertebla *al ĉiu homo sur la tero*, – laŭ tio, kiom *tiu* ĉi homo mem povas prepari sin por tio, – kion mi komparas kun „*naskiĝo*“ de Dio en la animo.

Miaj libroj estas skribitaj nur por ke ili direktu la tie ĉi menciitan, nepre necesan preparadon *sur la ĝustan vojon*. Sed preskaŭ ĉiuj homoj – kun ekstreme malmultaj esceptoj – estas tiom profundiĝintaj *en sia intelekta konscio*, ke eĉ la plej obtuza, kiu kontentiĝas per kelkaj mizeraj pensoj,

tamen vivas sian vivon, anstataŭ en realo, nur „*en pensado*“, kaj rigardas tiun ĉi vivon en pensado kiel sian realan vivon, same kiel la homo plej riĉa je pensoj. Tial estis necese montri, kie la *preparado*, kiun oni postulas de la animo por la spertado de sia vivanta Dio, havas sian lokon ene de la strukturo de la eterna substanco spirita vivo. Tio ne povis esti farata aliamaniere ol per la prezentado de ĉio, kio estas ampleksita de la vivo de l' substanco spirito, kaj mi ne rajtis lasi nemenciita ion kio iel taŭgis por alporti klarigon, nur pro tio, ke ĝi fariĝas spertebla *ne por ĉiu homo*. Mi devis prezenti *multon*, se mi volis rezultiĝi, ke kelkaj homoj decidus fari *tion malmultan*, kion miaj libroj atendas kiel *minimumon* de ĉiu, kiun ili atingas.

Ricevu mian benon, kaj lernu pli kaj pli ekkoni, ke ĉiu esprimado de spiritaj aferoj devas kalkuli kun la neebleco ampleksi la realan spiritan vivon per vorto de lingvo!

## Dudeka letero

Kvankam vi trovos min ĉiam sendube preta, helpi vin aŭ aliajn sur la vojo al konsciiĝo en la eterna spirito, – kvankam mi ĝoje uzas ĉion por helpi al vi kaj aliaj fari la preparojn, kiuj nepre devas esti farataj de vi, se via vivanta Dio povu „naskiĝi“ reale kaj al vi konscie en via animo, – mi tamen devas peti, ke oni neniam provu irigi min en kampojn, de kies problemoj, tiom efemeraj, mi kategorie

devas deteni min, se mi povu spirite plenumi tion, kio estas ebla *al mi sola*.

Mi devas bone gardi mian ĉelon,  
Kontraŭ la bru' pri vanta okazado,  
Kontraŭ grandgesta konduto  
Pri aferoj ŝanĝiĝantaj  
Kiel la blovo de ventoj.

Estas por mi neeble respondi al ĉiuj,  
Kaj samatempe, en *spirita* okazado,  
*Malligi la ligojn*, kiuj ĉiujn ligas,  
Kaj kiuj *devas* esti malligitaj,  
Se io tera  
Trovu sin en lumo.

\*

Vere ne estas indiferenteco por la ĉiutagaj teraj zorgoj de miaj kunhomoj, kiu kondukas al tiu ĉi rifuzado – laŭ strikta postulo metita sur mi – de *ĉiuj* demandoj *foraj* al tio eterna spirita! Ekzistas sufiĉe da homoj, kiuj dediĉas sin al la solvado de tiaj demandoj, sed en la nuna tempo kaj ĝis *tre* fora tera estonteco ekzistas *neniu* homo krom mi, kiu kapablus spirite valide plenumi la taskon de pure spirita benohelpo por ĉiuj kapablaj ricevi ĝin, kaj samtempe la diskonigadon, kiu estas mia devo, en formo vortigita en tera lingvo. Tial, nura ekonomio en la uzado de terhomaj ebloj postulas, ke mi eluzu miajn fortojn *nur tie*, kie unika laboro por miaj kunhomoj tie ĉi surtere estas ebligita *al mi sola*, sed kie *ĉiu alia* hodiaŭa homo uzus siajn fortojn *senutile*, se li volus fari, ekzemple el *la tera sfero*, la

malsaĝan provon estri la aferojn, kiujn mi kapablas gvidi nur tial, ĉar mi ilin primajstras *el mia eterna esto*.

Mi ne volas uzi vortojn, kiuj en la fluo de du jarmiloj fariĝis, en unika maniero, sanktaj por homoj adorantaj ilin, sed mi tamen devas atentigi tie ĉi pri mia eterna spirita deveno, en kiu mi estas nedisigeble en la „*Patro*“ kaj *unu* kun li en tiu individua el la dek du „*Patroj*“, per kiu la *Patro* spirite „*generis*“ min en la pralumo. Do estas nur *la aferoj de la Patro*, al kiuj mi hodiaŭ celas krei esprimon, estante nun unuigita tie ĉi en la tera sfero al tiu, kiu en la spirito estis doninta sin al mi, antaŭ ol la tero estiĝis. Mia surtera ekzisto havas sian sencon nur en la servo, ĵure promesita antaŭ eternecoj, kiun ĝi hodiaŭ havas por prezenti al mi, la spirite generito, dum la tempo difinita por lia surtera vivo.

Vere mirige estus, se ĝi povus servi *ankaŭ al io alia!*

Kiel la aferoj inter naskiĝo kaj morto povas esti formata kaj vivata tiel, ke la el ili rezultantaj efikoj, etendiĝantaj en tion nevideblan kaj ĝis en la mondojn de la eterna spirito, fortoplene progresigas la animon, mi montris en ĉiu loko de miaj libroj, en kiu mi parolas pri tiuj ĉi aferoj.

Kiu *volas* ricevi konsilon, tiu do devas serĉi ĝin *en tiuj ĉi libroj*, kie li facile povas trovi ĝin, se li aplikas tion tie diritan al la aparta afero, por kiu li bezonas konsilon, eĉ se lia afero devas unue esti disligata el la plektaĵo de la tempaj cirkonstancoj, se la vortoj aplikeblaj al ĝi fariĝu ekkoneblaj.

Mi do povas ankaŭ vin nur peti konsulti tion *kion mi skribis*, ĉar temus pri agado diametre kontraŭa al la strukturo de la eterna spirita vivo – en kies ordo mi estas enigita kaj el kiu mi devas fari tion, kio apartenas al mia tasko –, se mi volus enmiksiĝi en la terajn, multfoje ŝanĝiĝantajn problemojn kaj demandojn, pri kiuj ĉiu unuopulo mem respondecas kaj kiujn li sola devas decidi.

Vi komprenos, ke, se mi havus la rajton juĝi tie ĉi, estus vere facile al mi formuli respondon al via demando, al kiu vi estus devigita konsenti ankaŭ tiam, se ĝi estus tre fora de via propra opinio. Sed ĝuste tian devigon, kiu estiĝus *nevole* kaj *neeviteble*, malpermesas al mi strikta spirita leĝo.

Estante en la beno de la lumo, vi trovu tion por vi ĝustan *en vi mem!*

## Dudekunua letero

Se vi volas koncepti la „Patron“, – kiu ja ne estas alirebla al via *konscio*, kvankam ankaŭ vi vivas el li, – kiel „*unueco spertanta sin en dek du memreflektoj*“, vi tute ne malproksimiĝas de la realo. Sed tiam vi devas aldoni la unuecon el ĉiuj dek du „memreflektoj“ kiel ion *dektrian*, same kiel „sciantoj“ de la antikveco tion faris pro bona kaŭzo. Oni povas diri kun certeco, ke la dekduo de disĉiploj raportita en la evangelioj, kun Jesuo kiel la dektria spirite ampleksanta ilin ĉiujn, apartenas al tiu ĉi temo. Sed

mi volonte lasas la arkeologojn juĝi, ĉu ankaŭ la „dek du dioj“ de la egiptoj, la grekoj kaj la plej fruaj loĝantoj de Italujo, same kiel la pli malfruaj romianoj, povas esti interpretataj en la sama senco. Estas tute negrave – kiel mi diris jam en pli frua letero ĉe alia temo – ke inter tiuj „dek du dioj“ troviĝas ankaŭ *virinaj*. Kvankam mi estas tre danka al la arkeologio pro kelkaj eksteraj raportoj signifaj por mia spirita spertado, mi bedaŭrinde ne scias, ĉu ekzistas indikaĵoj por tio, ke oni povas supozi diofiguron laŭkrede ampleksantan ĉiujn „dek du diojn“ aŭ imanentan en ili ĉiuj. Sed tiu *dektria* figuro estus grava, se oni kun plena certeco rilatigu la kulton de la „dek du dioj“ al la eterna „Patro“. Sed koncerne al la rondo de la „dek du“ ĉirkaŭ Jesuo, ĉiu el kiuj estas *nome* menciita en la raportoj, mi ne intencas dubante tuŝi la historiecon de tiuj viroj. Sed oni estus povinta menci *malpli* aŭ *pli* de la disĉiploj de Jesuo en tiom aparte emfaza maniero, se tie ĉi ne estus intencate montri paralelaĵon al la patro-mistero, kiu en la tempo de Jesuo estis konata ne nur al unuopaj „sciantoj“, sed al tutaj unuiĝoj de misteranoj, el kiuj multaj poste fariĝis anoj de la instruo de Jesuo.

Sed via demando montras al mi, ke vi havas certan pretecon lasi vin al *senutila cerbumado*, kio estus neniel progresiga por vi.

Kiom ajn signife estas por vi, veni al klara ĝusta imago pri Dio, tiom malmulte gravas, esplori la novajn ekkonojn aperantajn al vi sur via vojo, kaj la nociojn rezultantajn el ili, por eltrovi ĉiujn plej diversajn manierojn interpreti ilin. Kiam la turhorloĝo sonas la *sepan* horon, tute sufiĉas, ke vi

ekkonscias *tiun ĉi hornombron*, indifere, ĉu vi eksciis, ke oni povas submeti al la sonorilaj frapoj, sonantaj en ekzakte egalaj intervaloj, ritmon difinitan de iaj korpaj proporcioj, kiu povas esti ekzemple:

$$1 \cdot 2 - 3 \cdot 4 - 5 \cdot 6 - 7,$$

aŭ:

$$1 \cdot 2 \cdot 3 \cdot 4 - 5 \cdot 6 \cdot 7,$$

aŭ:

$$1 \cdot 2 \cdot 3 \cdot -4 \cdot 5 \cdot 6 - 7.$$

Se en via cerbo subite aperas la penso, ke oni povas provi pense prezenti spiritan fakton, pri kiu vi aŭdis de mi, en iu alia maniero, tiam senĝene sekvu ĝin, sed akceptu la rezulton kiel ion tute naturan, sen lasi vin enigi en specon de ekscito de malkovrinto, kiu ekscito nur detruas al vi la perspektivon, el kiu vi lernis vidi kaj kapti tion, kio jam klariĝis al vi. Tiom da vidpunktoj, tiom da *opinioj* estas eblaj, kaj ĉiuj *povas* esti ĝustaj, se ili ĉiuj rezultigas la klaran, nedistorditan bildon de *tio*, kio estu komprenata!

Kaj sole la *rezulto* de via penado donas al tiu ĉi penado la pravigon, indifere, ĉu vi malfermas la pordon de ŝranko per tio, ke vi fortege tenadas la ŝlosilon en ĝia pozicio en la ŝlosilo kaj igas du virojn turni la ŝrankon ĉirkaŭ la akso de l' ŝlosilo, aŭ ĉu vi elektas la iomete pli facilan metodon: meti la ŝlosilon en la ŝlosilon kaj turni ĝin, dum vi lasas la ŝrankon stari tie, kie ĝi staras. –

Tiel ankaŭ la cerba koncentriĝo sur io difinita, *anime* ekkaptenda, ne estas tasko tro malfacila por unuopa homo. Sed komencante ĝin oni ne devas deklari militon al ĉiuj aliaj pensoj, havante la iluzion, ke tiam sur la malplena batalejo oni povas tute neĝenate interparoli kun la *dezirita* penso! Ĝuste komencita pensa koncentriĝo – kiun oni bezonas ofte *ankaŭ en la ĉiutaga vivo* – estas komparebla kun la serĉado de difinita loko sur la horizonto, de iu punkto de rigardo. Ekzamenante sennombrajn formojn per rapide moviĝanta rigardo, la okulo serĉas tion serĉatan. Tiuj formoj ja ne malaperas, kaj la serĉanto ne sentas sin molestita de ili. Multe tro intense li portas en si la bildon de tio serĉata, kiel ĝi prezentiĝas al proksima observanto. Sed estas ĝuste tiu bildo *el proksimeco*, kiu *unue malhelpas* la trovon, ĝis la serĉanto ekkonscias, ke li nun povas atendi nur la bildon *el malproksimeco*, post kio li baldaŭ perceptos tion serĉatan sur la horizonto. Se la bildo el proksimeco eble estis grandega turo, eble nun silueto elstaranta el multaj aliaj formoj kaj havanta la grandon de pinglopinto estas la bildo el malproksimeco. Sed nun la serĉanto kapablas facile fiksi sian rigardon sur tiu certigita bildo aŭ tuj trovi ĝin, sen senti sin iel ĝenata de la multaj aliaj formoj sur la horizonto.

La praktika utileco de tiu komparo estas facile trovebla.

Se oni volas veni al vera koncentriĝo, oni devas antaŭ ĉio klare kompreni, kiel la objekto, sur kiun oni intencas koncentri sin, *povas* esti ekkonata el la starpunkto, kiun oni okupas, ĉar ankaŭ en la mondo de pensoj validas leĝoj de speco de „perspektivo“.

Kiam oni imagis al si, *en kiu formo* la objekto de koncentriĝo povas prudente esti fiksata, oni tiam devas serĉi ĝin en *tiu ĉi formo* kaj pense „rigardi“ ĝin, dum kio ĉiuj aliaj ĉi-momentaj pensoj estu nur *ignorataj*, sed *neniam kontraŭbatalataj*, ĉar ili ĝuste rezulte de tio – estante instigitaj al *agado* – devus *malebligi* la ignoradon. Ankaŭ la migranto, kiu de sia punkto de rigardo trovis la serĉitan turpinton, samtempe optike vidas ĉion, kio troviĝas en lia vidkampo, ĉu temas pri formoj nemovaj, ĉu pri tio moviĝanta. Sed ĉion ĉi li apenaŭ konscias, tiom longe, dum la trovita bildo el malproksimeco prezentas al li la okazon interne sin okupi pri la realo, kiu konformas al ĝi.

Mia hodiaŭa letero ree helpu al vi superi kelkajn malfacilaĵojn!

Ricevu ĉian benon!

## Dudekdua letero

Kio nun klariĝis al vi, tion mi povas ĝoje bonvenigi, kaj mi komprenas, ke ĉe tiu „eltrovo“ vi havis la senton, ke finfine falis de viaj okuloj kvazaŭ skvamoj. Mi eĉ ankoraŭ hodiaŭ povas respekti la motivojn, kiuj, antaŭ ol mi pezakore transdonis ĝin al la publiko, estis instigintaj min kelkfoje uzi protektantan vualon, sed mi ankaŭ povas

kompreni, kiom liberiga oni eble sentas la konscion pri tio, ke oni nun scias kun tuta certeco, kio kaŝiĝas sub la vualo antaŭ malmulte ĝojigaj rigardoj.

Sed per tiu vualado mi samtempe intence lasis al la leganto la eblon, imagi al si la spiritan komunecon de la lumantoj de la pralumo laŭ sia propra maniero, por ke li ne fortimiĝu de antaŭ erare supozita kredpostulato. Sed ke la vero estis nenie perfortata, tion plej bone vi mem povas juĝi, post kiam vi nun ekkonis, ke la „estro“, – pri kiu mi diras, ke li ne estas „*elektata*“ nek „*nomumata*“, sed ke tamen neniam iu membro de la unuiĝo estas en dubo pri tio, *kiu* estas tiu „estro“, –: estas la „*Patro*“, pri kiu ni scias, ke ni lumantoj de la pralumo estas liaj spirite generitaj filoj, estantaj en la lokoj asignitaj al ni ene de la strukturo de la spirita vivo. Ke la uzitaj bildoj kaj paraboloj estos miskomprenataj, mi ne dubis, sed mi neniam estus kredinta, ke unu el tiuj, por kiuj miaj libroj vere estis skribitaj, povus miskompreni min, se mi tion ĝis nun ne sufiĉe ofte devus esti spertinta. Vi mem ja diras, ke *nur nun* finfine „falas de viaj okuloj kvazaŭ skvamoj“ ...

Sed ŝajnas, ke tiaj „skvamoj“ ankoraŭ kovras multajn okulojn, pri kiuj mi vere kredis, ke ili estas *liberaj* de ili kaj ne *bezonantaj liberigon*.

Ĉu vere estas tiom malfacile, ĝuste interpreti laŭ ĝia *pli profunda* senco tion, kion mi tiom zorge vualis nur tial, por ke ĝi eskapu al la malpuraj rigardoj de tiuj, al kiuj ĝi *ne* estu ekkonebla?! Mi mem ofte estas tentata *ĝoji* kvazaŭ senŝarĝigite, kiam mi renkontas iun aŭ alian

miskomprenon, ĉar estus vere malmulte agrable al mi esti komprenata de ĉiu. Mi *devas* malkaŝi min *sole* pro *tiuj kapablaj* vekiĝi en la spirito! Sed *tio*, kio tie ĉi estas malkaŝenda, faras tiun devon vere ne dezirita ŝarĝo. –

Multaj estas tial ankaŭ la lokoj, aparte en la komence aperintaj libroj miaj, kie mi – apenaŭ superinte min en tio mia tera, kaj konfesinte, ke mi estas tiu, kiu mi estas en la eterna spirito – tuj provis ree kaŝi min malantaŭ tio mia nur tereca. La eblecon tiel malaperigi min malantaŭ tio mia tempa ĉiam prezentis al tio ĉi la feliĉa situacio, ke en tiu nomo „mi“ povas elparoli sin *tio mia terece pereema* same kiel *mia praeterna substanca spirita esto*, ĉar tiu nomo servas al ĉio mia *eterna* same kiel al ĉio mia nur *tempe* propria.

Sed tio certe ne estas sekreto por vi, nun ke mi decidis, – pro kaŭzoj ŝajnintaj al mi vere sufiĉe gravaj –, prezenti la tri ĵus publikigintajn malgrandajn librojn, kiuj entenas en *ritma* formo serion da konfesoj, kiuj estas perforte eltireblaj el la tera homo nur malfacile, kaj nur vidalvide kun la „finaj aferoj“.

Sed eĉ tie ĉi la diskoniganto ree kaj ree volonte rigardas tion sian eternan, same kiel tion mian konscian al mi de eterne, ankaŭ el la tereca perspektivo de sia tempa pasemo. Do, tie ĉi kiel jam alialoke, devas esti lasate al via decido, sentante eltrovi, *kio* parolas en ĉiu unuopa okazo, ĉar mi tute ne intencis nenecese subpremi, pro mia eterna esto, la sentojn de tio *tempa*, sur kio baziĝas la *ebleco* de mia diskonigado.

Sed la sentoj en la animo pri *tio eterna* estas esence *diferencaj* depende de tio, ĉu tera homo deire de sia starloko akiris enrigardon en ion spiritan *en meditado kaj anima luktado*, aŭ ĉu li *partumas je tio sia eterna per eterna esto spirite kaj korpe unuigita kun li*, esto, kies aganto li estas por la tera mondo.

Mi dekomence tre bone sciis, kiom multe mi devas premisi ĉe miaj kunhomoj, por kio la necesa imagokapablo estas nur malofte trovata.

Portanto de eterna konscio – kiel ajn oni eble nomas lin –, kiu kunigas, eĉ kunfandas sin al tera homo: al ties eterna animo kaj al ties tempa, pasema korpo, surbaze de la devo libervole surpranita, antaŭ neimageblaj tempoj, de la eterna spirita individueco de tiu tera homo, – por la moderna eŭropano tio estas nenio alia ol serio de absurdaj revadoj, kiujn li trovas pardoneblaj nur kiel rezulto de cerba malsano. Kaj konsiderante lian absolutan mankon de sentemo por eternaj aferoj, oni eĉ ne devas riproĉi al li lian animan nesciadon. Li ne *povas* reagi aliamaniere!

Ne estas mirige, ke mi des pli ĝojas, kiam mi renkontas tiom multajn neatenditajn esceptojn, tiel ke ankaŭ via kara letero, kiu montras vin al mi kiel plej ĝojigan escepton en la senco tie ĉi menciita, estis kaj restos por mi treege granda ĝojo.

Se vi povus decidiĝi ankoraŭfoje legi ĉiujn miajn librojn – kiujn vi ĝis nun provis tralabori intelekte kaj alproprigi al

vi anime –, sed nun helpe de via nova ekkono, vi kredos, ke vi ankoraŭ tute ne legis la tekstojn. Tiom aliamaniere prezentiĝos al vi ilia senco en multaj lokoj, kiuj antaŭe restis neekkaptitaj.

Ĉia beno el la eterna spirita lumo, en kiu mi vivas, estu kun vi!

## Dudektria letero

La limoj inter tio, kio en la eterna spirito estas spertebla al la animo de *ĉiu* tera homo, kaj tio, kion nur lumanto de la pralumo kapablas sperti, ne ĉiam estas precize difinitaj en miaj libroj. Tiurilate vi plene pravas. Sed kion vi tute ne povis scii, estas, ke tiu nepreciza apartigo, kiu ŝajne prezentas mankon, estas postulita kaj determinita de tio donita en la realo, tiel ke tute ne estus estinta eble al mi fari pli precizan apartigon.

Pripensu, ke en *ĉiu* tera homo, malgraŭ la animala egaleco rilate al la korpo kaj al la *dissolvebla* „animala animo“, kiu estas *funkcia rezulto* de tiu korpo, vivas ankaŭ *io eterna*, eĉ se ĝi en multaj homoj restas latentaj dum ilia tuta vivo. Tiu ĉi eterna „spirita fajrero“, por kiu la *eterna animo* (eterna ĉar formiĝanta el eternaj animeroj) estas vivregiono, okupas en la strukturo de la eterna spirita vivo sian lokon *sole al ĝi* rezervitan, same kiel la eterna lumanto de la pralumo okupas la sian. Al la lumanto aganta *en tera*

*korpo* tia spirita fajrero, kaj kun ĝi ties eternaj animeroj, estas spirite *unuigita* de antaŭ nemezurebla tempo, tiel ke fine ankaŭ lia animala animo kaj lia korpo spertas la influajn efikojn de la eterna lumanto, kies tempaj iloj ili estas, tiom longe, kiel ili povas resti vivaj en la fizika tera sfero.

Al la lumanto de la pralumo ja estas donita *ĉiu* ebleco de spertado en la vivo de la spirito ĝis en la *plejinterno* de tiu vivo, ĉar li konscias en, kaj el, tiu plejinterno. Sed li povas doni parton en sia spertomaniero, penetranta *ĉian* spiritan vivon, nur al *tiu* eterna individua homa spirito, al kiu li unuigis sin en la eterna spirito por, pere de li, havi iam surtere la eblon doni spiritan helpon. Tiun „partodonadon“ li faras per tio, ke li reale „enprenas“ lin en sin, jarmilojn antaŭ ties posta „animaliĝo“, kaj tiel lasas lin partopreni en ĉio, kio estas vivo en li mem. Tiu „enprenado“ estas spiritleĝa sekvo de la libervola devoligo surpranita, ne-imageble longan tempon antaŭe, de la homa spirito, kiu ekde nun ĝuas plej misteran preparadon. Al ĉiuj aliaj eternaj spiritaĵaj fajreroj surtere enkarniĝintaj, la lumantoj de la pralumo povas helpi nur en tio, ke ili havigu al si siajn eternajn animerojn kaj ekmastru ilin, por trovi sin mem en la konscio de sia animo kaj por povi krei la animan *formon* adekvatan al ili kaj unuigi sin kun ĝi. Ĉar ekzistas konstantaj influoj inter la eternaj animeroj kaj la cerbe kondiĉataj ekkonado, sentado kaj spertokapablo, tiu ĉi anima vekiĝo povas esti decide progresigata deire de la *regionoj de imago* de la tera homo, same kiel, aliaflanke, la influoj el la eterna spirito tra la individua formo donita en la eterna spiritofajrero de l' homo, povas iom post iom

penetri la tutan animalan korpon tiumaniere, ke ĝi povas fariĝi kapabla enkorpiĝi la spiriton surtere.

Al tio spirita en ĉiu unuopa tera homo respondas difinitaj spiritaj manieroj de spertado alireblaj *nur al li sola*, kaj la nombro de tie ĉi eblaj kombinaĵoj estas *senfina*, tiel ke estus tute neeble prezenti ilin ĉiujn, aŭ eĉ nur grupe karakterizi ilin. Ĉar la edukado de l' imagovivo havas tiom grandegan gravecon, kaj homo serĉanta deire de la tera vivo la vojon al tio spirita havu, se eble, ioman teran scion pri tio, kio *povas* fariĝi al li spirita sperto, estas pli bone, ke li sciu pri *ĉio*, kio povas fariĝi spertebila al homoj, ol ke mi priparolu nur tion plej ĝeneralan, sed silentu pri ĉio speciala. Mi jam diris al vi iam, ke ĉiu serĉanto sincera al si mem scios tuj, kio en miaj instruaj tekstoj aplikiĝas *aparte al li*; sed povas doniĝi al li pli granda kaj pli profunda enigardo en la naturo de ĉio spirita, se li sciiĝas ankaŭ pri *aliaj* eblecoj, pri kiuj li spontanee sentas, ke ili laŭspece *ne* estas taŭgaj por li, eĉ se aliuloj tiamaniere atingas la saman celon.

Temas pri mallumaj, obtuzaj atavismoj, kiuj eksplikiĝas per nia animalkorpa origino el la substanco de l' planedo, kiam ree kaj ree viviĝas en la kapoj la kontraŭspirita penso, ke ĉiuj homoj estas „egalaj“ antaŭ Dio. Estas tie ĉi konsola nur la ideo, ke tiu „dio“ de *enuo* estas la produkto de *egalvalora* kaŭzo. – Sed la realo konas nur *infinitoblan diversecon* en la rilatoj al Dio ene de la strukturo de l' vivo en la eterna spirito. Egaleco antaŭ Dio estas rajte asertebila nur koncerne tio, ke ĝi rilatas *al la korpa animala naturo* komuna al ĉiuj teraj homoj, kiu originas el la planedo kaj

refalas al ĝi. Sed kiom la duala estaĵo, kiu surtere modeste opinias sin la *tuta esenco* de la „homo“, apartenas al la *spirita* naturo, ĝiaj unuopaj spiritfajreroj estas *pli diferencaj* unu de la aliaj ol ĉio diferenca, kio ekzistas surtere kiel distingeblaj teraj formoj! Kaj ne nur koncerne la inter-apudan ordon, sed ankaŭ rilate al la neimageble akre difinita hierarkia ŝtupo de individua kapableco ene de la spirita vivo.

Tie ĉi *nenio estas marĉandebla* per formado de filozofiaj nocioj, kiuj en la sfero de la realo estas tiom malmulte hejme, ke oni tie ne perceptas ilin eĉ kiel ombrojn aŭ siluetojn.

Tie ĉi ankaŭ *nenio estas aĉetebla*, ĉar ĉio, kion *aliulo* havas, estas, *samamaniere* kiel tio propra, eterne necedebla posedaĵo baziĝanta en la strukturo de la spirita vivo.

Vi vidas, ke ekzistas eĉ *tre* akraj limoj inter la spertoeblecoj de la unuopaj spiritaj individuoj, sed vi certe jam ekkonis ankaŭ, ke la surfaco de la tero ne sufiĉus por desegni ĉiujn tiujn limojn, kaj ke la, laŭ vi dezirinda, „pli preciza apartigo“ de tio, kion sperti estas eble nur al la lumanto de la pralumo, disde tio, kion povas enpreni ĉiu homa spirito post la vekigo de sia animo, fariĝus tute nebla sole per tio, ke en la unua okazo temas pri spertokapablo ampleksanta *ion senliman*, en la alia okazo pri la plej diferenca spertokapablo de *io memlimigita!*

Vivu en la beno de la lumo!

## Dudekkvara letero

Ke mi iun tagon aŭdus de vi tiun ĉi demandon, mi atendis kiel certaĵon. Mi miras nur, ke vi ne jam antaŭ longe metis ĝin al mi. Mi ankaŭ miregas pri tio, ke ĝi estis metata al mi de serĉantoj *tiom malofte*. Ŝajnas al mi, kvazaŭ oni timas, ke mi povus respondi ĝin tiel, kiel oni ne deziras ĝin respondita ...

Estas rakontite pri Jesuo, kiel estas konate al ĉiuj kristanoj, ke li laŭdire iam diris: „Kiu malkonfesos min antaŭ homoj, tiun mi ankaŭ malkonfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo.“ En tiu ĉi versio: – kiel *minaco*, – tiu ĉi vorto certe ne eliĝis el la buŝo de Jesuo, sed tiu minaco tute konformis al la opinio kaj volo de kreskanta komunumo de misteroj, kiu tiutempe ĵaluze luktis por la laŭnombra prioritato antaŭ aliaj kultsocietoj, kaj kiu estis tiutempe malligonta sin el la popolo de la antikva judaro, kiu estis naskinta tiun komunumon per unu el la siaj, kvankam nevole. Tiel la sanktoleito, al kiu oni nun, laŭ ekzemploj ĉirkaŭe troveblaj, proksimigis sin en „*mistero*“, „*devis*“ esti parolinta, kaj tial li „*estis*“ parolinta tiel! La raportoj pri liaj vivo kaj instruo tiutempe estis nur kulte uzataj *tekstoj por recitado*, kaj ankoraŭ ne, kiel poste, „Sankta Skribo“. Sed por la formantoj de la tekstoj tamen ekzistis pruvila okazo por formuli tiun minacon, ĉar Jesuo iam vere estis atentiginta pri tio, ke neniu povas „esti sklavo por du sinjoroj“, – do ne povas kondukti en la ekstera

tera vivo *aliamaniere*, ol preskribas al li lia anima ekkono, se li ne volas perfidi sin mem. Sed tio signifis nur, ke tera konduto devas konformi al *eterna* leĝo, kaj ke homo ne povas vivi sian teran vivon laŭ *unu* sistemo kaj samtempe kapablas laŭ *alia* sistemo veni al sia eterna savo. El tio oni facile povis manipule fari la minacon, kiun oni bezonis, por devigi la *animan timon*, originantan sole el la animala animo, en la servon de la propagando por la nova kulto de mistero. Oni ne lasis spacon por dubo; ĉar tio ne konformis al la tiama kutimo. Ekde nun, la majstro, la sinjoro, la sanktoleito estis „dirinta“, ke li ne agnoskos antaŭ sia ĉiela patro tiujn, kiuj dum sia surtera vivo ne estis pretaj propagandi lin – kio tie ĉi signifas: la societon kulte spertantan lin en nova mistero – kiel plenumanton de ilia anima antaŭsentado, fronte al ĉiuj alipensantoj. Ke la psikologia juĝo pri iliaj kunhomoj fare de la unua estro de la tiama nova misterokulto estis *ĝusta*, oni ne dubos. Sed oni ankaŭ ne devos dubi, ke la *nur okaza* observado de instrukcioj pri spirita vivo – kaj esence pri tiaj temas en la instruo de Jesuo – estas nur frivola ludado kaj sensignifa antaŭ la eterna spirito, se ĝi ne eĉ ekigas kontraŭfortojn en la spirito, kies terura justeco devis kaŭzi skuantan timtremon en la animo de ĉiu, kiu iam perceptis ilian efikon sur aliuloj surtere. Do en certa senco oni ja povas legi el tiu minaco, formulita post la vivo de Jesuo, la malmolan veron, ke ĉiu okupiĝo pri instrukcioj donitaj el la spirito *ne* kondukas al la alstrebita celo, se tiu konanta tiujn ĉi instrukciojn ne tiras el ili la konsekvencojn, vidalvide al la *tuta* ekstera mondo. Ankaŭ vi nun vidas vin antaŭ la neceseco tiri la konsekvencojn el la instruoj ricevitaj per mi, en la ekstera vivo, antaŭ la ĉirkaŭa mondo, kaj deklaras

vin preta fari tion, sed ankoraŭ ne estas klare al vi, kiel tio devas okazi.

Sed mi jam montris en mia libro „La vojo de miaj disĉiploj“, kiom erara estas la „volo konverti“ homojn al la instruoj prezentitaj en miaj libroj, tiel ke mi apenaŭ bezonas ankoraŭ averti vin kontraŭ tiu vojo. Sed oni ankaŭ absolute mistaksas la sencon de *la ekzisto* de tiuj ĉi libroj kaj ilian vere *unikan* ankriĝon en la eterno, se oni, plena de bonintenca agemo por ilia disvastigo, kredas, ke estu kreata „oficiala“ agada bazo por ili.

Via demando, kiel vi nun ankaŭ en la ekstera mondo tiru ĝustamane la konsekvencojn de via spirita progresado, devas esti akre apartigata disde la eblecoj – menciitaj de vi en tiu ĉi kunteksto – rilate al miaj spiritaĵaj instrulibro.

Certe, per miaj eksplikoj en la libro „La vojo de miaj disĉiploj“ mi ne volas aperigi nedezirite, se oni rekomendas iun de miaj libroj al aliulo, same kiel oni rekomendas romanon, per kiu oni mem estis artisme impresata. Mi avertas en mia libro sole kontraŭ pli aŭ malpli trudema „misiado“, – kontraŭ tio, ke oni kvazaŭ vokas sin mem al laŭsupoze necesa *apostoleco*.

Krome, estas evidentaĵo kaj nur observado de literatura deco, ke oni *klare indikas la fonton*, se oni citas el miaj libroj aŭ lasas sin „inspiri“ de vortformaĵoj troveblaj en ili. Finfine la diskonigoj en miaj libroj estas *formitaj de mi*, kaj tiu ĉi formo estas *mia spirita propraĵo*, pri kiu mi ne volas, ke oni, je la amuza preteksto, ke ja temas pri instruoj donitaj el la spirito, faras ĝin libera predo. Kaj ne nur la

*artisma* formo estas mia ekskluziva spirita propraĵo, sed ankaŭ la pure *pensa* prezentado!

Sed ĉio ĉi apenaŭ koncernas vin, ĉar la „konsekvencoj“ estiĝantaj el la enpreno de miaj instruaj tekstoj rilatas tute ne *al la libroj*, sed al *via praktika konduto en la ekstera vivo*, kaj tie ĉi certe ne estas tro malfacile ekkoneble, ke iom post iom devas malaperi el tiu ĉi vivo ĉio, kio ne estas plene akordigebla kun la observado de la konsiloj kaj instruoj en miaj libroj. Same estas facile kompreneble, ke ne sufiĉas nura evitado de *tio neakordigebla*, sed ke vi nun havas ankaŭ la moralan devon enriĉigi vian vivon pli kaj pli per konscia kaj volita formado de *tio pozitiva* konformanta al miaj konsiloj, en viaj tutaj farado, parolado kaj kondutado. Per „parolado“ mi tute ne celas la konstantan paroladon pri miaj vortoj. – Sed pri via parolado vi ĉiam povu – en vi mem – *respondeci* antaŭ miaj vortoj.

Aliaflanke vi ĉiam estas libera, tie kie vi opinias konvene, ankaŭ konfesi, indikante mian nomon, ke vi estas observanto de miaj instruoj, sed tio okazu en maniero, kiu sufiĉe konformas al la digno de tia konfesado, do similmaniere, kiel science aktivantaj homoj konfesas kun plena natureco sian apartenon al iu „skolo“, grupo kun unueca strebado surbaze de certaj ekkonoj, kaj ties fondinto.

Per tio mi deziras fini tiun ĉi leteron, esperante, ke mi respondis vian demandon konsiderante ĉiujn ĝiajn aspektojn.

Ju pli vi zorgas, ke viaj ekkonoj vekitaj per miaj spiritaj instrulibroj havu *praktikan influon* sur vian vivon, des pli vi servos ankaŭ al via ekstera vivo.

Estu benata en ĉio bona, kion vi, konformante al spirita leĝo, portas en la eksteran mondon!

## Dudekkvina letero

Via interpreto de tiuj lokoj en miaj libroj, kiuj parolas pri tio, ke ankaŭ homo, kiu estis elfarita majstro de spirita agado sur tiu ĉi tero, *povas* proprakulpe fali el la alta lumado, kaj ke ekde antikva tempo *ekzistas* tiaj homoj falintaj per propra sakrilegio, tute konformas al tio celita de mi, kiam mi menciis tiujn malfeliĉulojn. Sed ĉar vi eksplicite petis min respondi, ĉu mi povas konfirmi vian interpreton, tiu konfirmo estu tie ĉi *donita* same eksplicite. Probable estus estinta praktike sensignife por vi, se vi eble estus inklininta al imagoj deviantaj de tio celita de mi. Por trovi vian propran vojon al la kapablo sperti la eternan spiriton, vi vere ne bezonas povi doni al la tie ĉi cititaj lokoj de miaj libroj la detalan interpreton, kiun vi fine trovis per via privata intereso. Sed estas certe pli bone, ke oni en sia imago ne toleras eĉ la plej malgrandajn neklarajojn, kaj tial mi tamen bonvenigas, ke vi ne estis kontenta, ĝis vi estis trafenetranta per neerarigebla rigardo ankaŭ tion plej teruran, kio surtere povas okazi.

Sed kiam mi skribis la koncernajn lokojn, mi tute ne pensis, ke iu leganto rompus al si la kapon pri tio, alie mi vere estus aldoninta pliaj detaloj al tio, kion mi menciis nur pro la kompleteco de miaj prezentoj. Sed kial mi estus devinta rigardi ilin kiel necesajn? Mi ja tute ne povis supozi, ke pensanta homo povus veni al la opinio, ke *lumanto de la pralumo*, eterna estaĵo spirite generita kaj sendita el la „Patro“ en tiun ĉi teran mondon, povus sub iuj ajn cirkonstancoj sperti sian spiritan dissolviĝon dum horora, eonojn longa vualiĝo de konscio. Same malmulte mi povis, post ĉio kion mi estis dirinta alialoke pri la „eterna spirita fajrero“ en la tera homo, supozi, ke oni opinius dissolvebla tiun ĉi eternan spiritan poluson de la *tera homo*. Mi ankaŭ estis klare parolinta pri la *animo*, kiu estas fariĝinta „regno“ de la eterneco, kies „krono kaj sceptro“ povas neniel fariĝi perdebla al „*tiu akceptita*“ en la unuiĝo de la lumantoj, krom per li mem. Mi ankaŭ neniam ricevis leteron, aparte de via lasta, el kiu oni povis vidi, ke miaj vortoj kaŭzis malfacilaĵojn al iu leganto. Kiel oni vidas, ankaŭ *vi* sukcesis doni al *vi* la ĝustan respondon al ĉiu demando, kiun *vi* mem metis al *vi* en la koncernaj lokoj.

Ĉar la lumanto de la pralumo, kiu komencas terhoman agadon, unuigas sin tiom totale kun la homa spirito, devontiginta sin propravole antaŭ neimageblaj tempoj, kaj ties posta terhoma prezentaĵo, ke dum la surtera vivo oni devas paroli preskaŭ pri *kunfandiĝo*, rezultas el tiu unuiĝo formo de la animo, kiu kapablas senti en si *ĉion* tie ĉi unuigitan kaj partoprenas en *ĉia* konscio tie ĉi donita. Kie

tiu ĉi animformo ne estas kondamnata al dissolviĝo per malprudenta uzo de l' volo fare de la tera homo, tie ĝi post la finiĝo de la terkorpa vivo ne nur *ne perdiĝas* al la eterna homa spirito, sed kune kun li *konserviĝas* samtempe ankaŭ al la eterna lumanto kaj al si mem en li. Sed ankaŭ tie, kie ĝia dissolviĝo, kiu povas *ebliĝi* sole per la *volo-orgojlo* de la surtere *pasema* parto de la priskribita kunfandiĝo, fariĝas *neevitebla*, tute ne „perdiĝas“ la eternaj praesto-elementoj, kiuj en sia alta formo kiel „animeroj“ estis iam formintaj la animformon komunan al la lumanto kaj al la eterna spirita homo, sed nur *retroŝanĝiĝas* en sian propran *eliran formon*, post kiam ili, kiel priskribite, malligiĝis el la antaŭe tiom perfekta animformitaĵo. Temas pri konsciodissolviĝo per la *perdiĝo* de la eterna mio, kiu mem tamen konserviĝas nevundebla en la spirito same kiel la lumanto, al kiu ĝi iam devontigis sin.

Sed, por la tera imagokapablo, tio alude menciita de mi estas sufiĉe komprenebla nur tiam, se oni, kiel vi, kontentigas sin per la konkludo: „Io eterna ne povas esti detruenda, sekve devas temi pri konscioformo, kiu estis formita ankaŭ por *servi* al io eterna, sed trovis sin fariĝinta tro granda por resti konscia pri sia esto donita *nur en* tio eterna kaj *por* tio eterna“. Sur pli malalta ŝtupo, tia perdiĝo de animo okazas ĉiutage *miloble* inter homoj surtere, kiuj certe *ne* estas unuigitaj kun lumanto de la pralumo. Ankaŭ pri tio mi skribis sufiĉe. Tute simile, ankaŭ tie ĉi la homo perdinta sian animon spertas post sia korpa morto la turmentoplenan dissolviĝon de sia konscio en neimageble horora nokto, estante kondamnita *scii* eonlonge pri tio neevitebla, sen povi *kontraŭagi* ĝin. – Kaj ankaŭ *ĉiuj ĉi*

*multaj* animdetruigoj neniel tuŝas la *eternan* naturon de la *animeroj*, kiuj partoprenis en la formado de la „perditaj“ animoj nun finiĝantaj en dissolviĝo. Sed ĉiu ĉi murdo je la propra animo estas ree kaj ree kaŭzata de la orgojla foriro el la *konscia ĉeesto antaŭ tio eterna*.

Estimi sin nur en *tio eterna*  
Kaj vivi spertante sin nur *en ĝi*,  
Estas vere pli malfacile  
Ol *ĉiu* tera strebado! –

Malmole fariĝas al iu surtera  
*Rezigni* por tio *sin mem*: –  
Eĉ *tera* strebado apenaŭ povas  
Elteni ĉi tian rezignon.

\*

La tragiko – ĉiam ripetiĝanta ekde praa tempo – de la tera homo konsistas en tio, ke li *detruas* sin ĝuste per tio, per kio li siaopinie sin *konservas* kaj levas sin *super* tio konservanta lin.

Mia respondo al via letero, kiu tre ĝojigas min, respondu kelkrilate ankaŭ tion ankoraŭ ne demanditan!

Estu konstante en la beno de la lumo!

## Dudeksesa letero

Portu tute trankvile la artisme kreitan ringon priskribitan al mi, kiun vi ricevis kiel valoran familiheredaĵon, eĉ se via konatulo, por kiu astrologiaj opinioj estas tre gravaj, timigas vin per sia malsaĝa averto, ke akvamarino ne estas „via ŝtono“. La „treege simpatiaj sentoj“ plenigantaj vin vidalvide al tiu ŝtono, estas *multe* pli certa pruvo de tio, ke la ŝtono havas oscilrilatojn parencajn al via naturo, ol ĉiuj hodiaŭaj astrologiaj kalkuloj, kiuj – necese – *devas* liveri neperfektajn rezultojn, eĉ se ili certe povas esti trafaj en unuopaj punktoj. Tromulto de la – reala aŭ nur *supozita* – malnova scio laŭsperte akirita perdiĝis, eble neniam ekzistis, aŭ estas hodiaŭ elmetita al ĉia misinterpretado. Ĝis *nova* laŭsperta scio tie ĉi povas esti plene certigata, oni povos iom apogi sin nur sur la *karakterologiaj* supozoj de la horoskopo, kaj ankaŭ nur tiam, kiam estis eble ricevi tute ekzaktajn detalojn pri la tempo de naskiĝo de la persono astrologie analizenda. Ke amase produktitaj, *tiel nomataj* „horoskopo“, ekzemple tiuj permanente ofertataj en gazetoj, devas tie ĉi resti tute ekster konsidero, mi certe ne bezonas konfirmi al vi.

Sed kio koncernas la asignadon de certaj *ŝtonoj* al diversaj homoj, *tre multaj* konstatoj de la astrologia rezulto povas esti juĝataj kiel decidigaj, dum la plej multaj – se ne ĉiuj – hodiaŭaj amatoroj kaj spertuloj de la astrologio lasas sin gvidi tro forte per la respektiva *ĉefa rezulto*. Tiel povas

okazi, ke astrologia kalkulo kaj tradicia interpreto de horoskopo asignas ŝtonojn al homoj, kiuj povas rigardi ĝuste *tiujn* ŝtonojn nur *kun malemo*, kio estas la plej bona pruvo de tio, ke la „preskribitaj“ kristaloj havas *neniajn*, aŭ eĉ *kontraŭagantajn* radiadajn rilatojn al la koncerna homa naturo kaj ĝia vivoritmo. Multaj okazoj de tia speco fariĝis konataj al mi. Mi ĉiam konsilis, ke oni lasu gvidi sin *per la propra sentado*, kiu ĝuste rilate gemojn respondas kaj decidas multe pli certe, ol la plej bona horoskopo, el kies interpreto oni provas determini „amikajn“ ŝtonojn.

Sed ne forgesu, ke la influo de gemoj sur iliajn homajn portantojn rilatas *sole nur* al la regiono de la animala, pasema *tera* fenomeno de la homo, tiel ke oni nepre ne atendu aŭ timu favoran aŭ malfavoran influon sur la *spirita* disvolviĝo! Plejfavoraokaze oni povus paroli pli *nerekta* progresiga aŭ malhelpa influo en la senco, ke por la homo portanta la ŝtonojn rezultas certa harmonio en tio lia teranimala, tiel ke en sia luktado por spirita konsciiĝo li spertas *pli malmultan perturbon* el tio sia tera, dum homo, kiu toleras je si en iu ornamaĵo ŝtonojn indiferentajn aŭ eĉ malsimpatiajn al li – eble nur pro ilia altvaloreco –, konscie aŭ nekonscie staras sub la influo de malharmonio, do de maltrankvileco, kiu *kontraŭagas* la *internan* trankvilecon tiom necesan por ĉia strebado al la spirito.

Tute ĝenerale oni devas konstati, ke la ŝtonoj – indiferente, ĉu temas pri gemoj aŭ rojaj ŝtonetoj – havas nombre difinitajn, *kosme* bazitajn rilatojn al sia portanto, kiuj determinas antaŭ ĉio ilian favoran aŭ malfavoran radiadan efikon. Tiu ĉi efiko povas esti preskaŭ

neperceptebla, sed ankaŭ nekredeble forta, kaj la forteco de la efiko estas ĉiam *paralela* al la forteco de la simpatio por la ŝtono. Sed mi tie ĉi ne celas la „simpation“, kiun oni prefere nomu avideco je posedo.

Temas pri io *esence* alia, ol pri tio aganta en *amuletoj* kaj *talismanoj*, kondiĉe ke tiuj estas ne samtempe *ŝtonoj*, kiam povas rezulti *kombinita* efiko. Sed kie ekskludiĝas la ŝtona radiado, tie efikas en amuleto aŭ talismano *sole* la *voloŝarĝo* entenata en la objekto, indifere, kiuj ajn signoj estas videblaj sur ĝi, kaj kiun ajn evidentan aŭ sekretan signifon havas tiuj signoj aŭ prezentaĵoj. Ĉiuj signoj aŭ prezentaĵoj posedas valoron nur kiel „ankroj“ por la voloŝarĝo. Sed tie ĉi gravas nur la forto de la „ŝarĝo“, kaj la plej modesta objekto, kiun patrino ardakore donas al sia foriranta filo elmetota al danĝeroj, povas fariĝi talismano anstataŭigebla per nenio alia. Sed ĉion ĉi vi trovos sufiĉe eksplikita en la ĉapitro „Fido, talismano, kaj bildo de dio“, kio revenigas nin al la „Libro pri la vivanta Dio“.

Vi vidas, ke en tiuj ĉi aferoj kunagas nenio sinistra, kaj ke oni ne bezonas, same kiel la nekredeble malmultaj *veraj* adeptoj en tiuj ĉi kampoj, doni sin al sekreta studado, se oni volas utiligi al si la „planedajn helpfortojn“, kiuj radiadas el *ŝtonoj* kaj *metaloj*, *koloroj* kaj *naturaj formoj*, aŭ ĝui la protekton de *veraj* amuletoj kaj talismanoj, kiom ili kapablas prezenti ĝin. Sed neniukaze vi lasu la treege kontestebajn kalkulojn fari vian sentadon necerta! Ju pli klare vi lasas vian sentadon „*paroli*“, sen konfuzi ĝin per

pensaj objektoj, des pli certe vi trafos la ĝustan elekton kaj procedos ĝuste en *ĉio*, kio povas veni en konsideron tie ĉi.

Sed krome ricevu *la benon de la eterna lumo*, kiu pliigu al vi la forton tie, kie „planedaj“ helpfortoj *ne* povus helpi vin!

Kion *planeda* forto  
kapablas doni al vi,  
Povas *helpi* vin nur  
*en via planeda tag'*!  
Iam *superinte* la trompan  
„lumon“ de *tiu ĉi* „tag’“,  
Vi ankaŭ trovis lumon  
de l' *eterna* tag' *en vi mem!*

\*

## Dudeksepa letero

Vi certe jam estas sur la spuro, sed via „urse fortika“ konstitucio, kiu neniam lasis vin „ĝustasence sperti tion, kio estas korpa suferado“, ne necese estas malhelpo, se vi volas plene ekkapti tion, kion oni komprenu sub mia esprimo „senvalorigo de la sufero“. Sed mi petas, ke vi permesu al mi rememorigi vin, ke tute ne temas nur pri korpe sentebla sufero, kiam mi parolas pri la neceso „senvalorigi“ la suferon. Anima sufero povas trafi ankaŭ homojn, kiuj estas praktike liberaj de ĉiuj malbonoj

povantaj turmenti la korpon, kaj la plej turmenta anima sufero estas sufero pro aliuloj.

Indiferente, ĉu oni pensas pli pri anima aŭ pli pri korpa sufero ĉe miaj vortoj, la postulo pri „senvalorigo“ restas la sama. Tiu ĉi „senvalorigo“ konsistas precipe en tio, ke oni forprenas de la sufero la grandan patoson, kiu estis donata al ĝi ĉiam denove dum multaj jarcentoj, tiel ke oni metis preskaŭ respekteton en la lokon de malestimado de, kaj batalado kontraŭ, la sufero. Estas spirite absolute necese, ke oni forigu en si kaj aliuloj la malsaĝajn kaj satane frivolajn imagojn, kiuj rigardas la suferon kiel edukilon aŭ punilon dekretitan de Dio, kaj samtempe ne lasas eĉ tiom malmultan spacon por pli alta ekkono, ke la homo povus ekscii, kian teruran koncepton pri Dio tiuj imagoj malkaŝas. Por homo konscia pri Dio, estas apenaŭ eltenebla sufero pro aliuloj, devi vidi, por kia abomenindeco oni aŭdacas opinii kredatan „dion“ kapabla, kaj ke oni eĉ prezentas tiun ideon al mizeraj turmentitaj homoj kiel „konsolon“! Kaj multe pli abomeninda estas la fakto, tiom multoble evidenta, ke la suferantoj akceptas tiun konsolon, ĉar tie ĉi montriĝas la nekredebla grado de nerezistemo kontraŭ tia impertinenta kredigo...

Sed estas kondiĉo por ĉiu tera homo, kiu volas konsciigi en la eterna spirito kaj ricevi en si mem sian vivantan dion, ke li lernu laŭeble ignori la suferon, sed almenaŭ malagnoski al ĝi ĉian moralan signifon! Tamen vi komprenu tiujn ĉi vortojn tute ne tiel, kvazaŭ, postulante la senvalorigon de la sufero, oni pretervidas, ke anima sufero kapablas ekskui homon, iel vivantan obtuze kaj obstine,

tiom ke li denove aktivigas sian volon, kaj ke korpaj doloroj povas esti faktoroj de saniĝo, kondiĉoj por kuracado. Sed tio estas sekvoj, kiuj povas esti kaŭzitaj de sufero, dum la sufero restas „mensogo“, ĉar ĝi trompe montras al tio spirita en la homo ligitecon, kiu estas trompe montrebla nur tie ĉi en la animala naturo de l' homo, ĝis li ekkonas ĝian senpotencecon.

Ĉia sufero ekzistas nur en la animala naturo, kiu tie ĉi surtere estas por ni dumtempa formo de manifestiĝo, kaj eĉ la plej kortuŝa anima sufero tie ĉi sentata baziĝas sole en la animala animo, kiu estas funkcia rezulto de la pasema tera korpo. Certe vi ne imagu, ke la animala animo de l' tera homo estas tiom malvasta kiom la animalaj animoj de aliaj teraj animaloj! Rezulte de ĝia ligiteco kun la eroj de la eterna animo spirite donita sole al la homo, animo, kiun la morto de l' korpo ne trafas, kaj kun la individua eterna vivo de la spirita homo, la animala animo de l' homo ricevadas tiom altajn influofikojn, ke preskaŭ ĉio, kion la tera homo, scianta plej malmulte pri si mem, nomas „anima“ sentado, – dume pensante al io eterne anima, aŭ al io pasema sed alte superordigita al tio animala, – estas spertata nur ene de la alte kultivita terhoma animala animo, kiu estas funkcia rezulto de la pasema korpo de l' homa animalo, same kiel la cerba pensado, kiu en la tera homo ankaŭ multege superas la pensadon de animaloj.

Mi vere aprezas la cerboligitan pensadon, tie kie ĝi restas en sia regiono, sed mi parolas emfaze ankaŭ pri alia speco de penso: – pri la penso, kiu pensas sin mem kaj, tute nedepende de la funkcioj de la cerbo, uzas ĉi tiujn nur tie,

kie ĝi volas fari sin mem terhome komunikebla. Sed kvankam mi multe admiras tion, kion la animala animo en la homa korpo kapablis formi el si, mi parolas en miaj libroj, en la lokoj temantaj pri la animo, preskaŭ ekskluzive pri la animo donita inter ĉiuj animaloj sole al la homo el tio lia spirita, dum la animala animo de la homo, kiu apartenas al tio lia pasema, ne prezentas al mi kaŭzon por doni konsilojn pri ĝia plia disvolvado. En la fluo de jarmiloj ĝi iom post iom atingis tioman nivelon de evoluo, ke ĝi en la plej multaj homoj kovras la eternan animon preskaŭ plene kaŝante ĝin, kaj estas vere necese lerni ekkoni, ke nedireble multe de tio, kion la tera homo rigardas kiel apartenantan al siaj plej altaj kapabloj, estas nur la faritaĵo de lia animala animo, – ankaŭ tie, kie ĝi penas okupiĝi laŭ sia maniero pri tio eterna, kio restas nealirebla por ĝi. – Kaj ankaŭ tio, kion ni surtere kutimas nomi „anima“ sufero, estas sentata ankoraŭ ene de tiu animala animo.

Kiam mi diras: „Ĉiu sufero estas mensogo!“, mi, kiel bona konanto de multobla sufero anime sentebla kaj terkorpe spertebla, neas vere ne la intensan dolorpotencon de l' sufero, etendiĝantan ĝis laŭsupoza netolerebleco, – sed ja ĝian patose emfazitan signifon atribuitan al ĝi de la tera homo, – t.e. en la senco de eduka rimedo direktata el tio eterna, – per kies permanenta agnoskado li por si mem kaj aliuloj nur plimultigas la surteran suferon, anstataŭ energie uzi ĉiujn terajn eblecojn por eviti ĝin ...

La preteco surtere suferi, prezentita de lumanto de la pralumo en sia terhoma manifestiĝo, ne apartenas al tiu ĉi temo, ĉar ĝi egalas „tributon“ libervole proponitan al la

„princo de la mallumo“, en kies regionon la lumanto penetris, rompante la leĝojn de la mallumo. Sed ĉiu sufero devas esti senmaskigata kiel malbono baziĝanta en la naturo de l' animalo, kiu estas devigo pure laŭleĝe eksplikebla, senfine malproksima de ĉia dia „destinitaĵo“ imagita kiel „edukilo“; sed ĝi ja estas voko al ĉiuj homaj fortoj kapablaj malpliigi aŭ forigi suferon. –

La „konsola“ diro, ke oni staras sub la puna vergo de Dio, kaŭzis inter la homoj de tiu ĉi tero pli grandan kvanton da preventebla sufero ol ĉiu terhoma malico! Sole per la konsekvenca okazado iniciatita de tiu kredo en la nevidebla parto de la fizika mondo!

Tie ĉi aktivas la „turmentantoj“, pri kiuj mi parolis en la „Libro de la Reĝa Arto“, nova eldono, paĝo 101.

Ili estas organike formitaj inteligentecoj de la nevidebla fizika mondo, en kiuj ĉiu sufero, kiu estas spertebla en videbla, palpebla fizika korpo kaj en la animala animo ekzistanta dum ĝia vivodaŭro kiel ties funkcia rezulto, ekigas sentojn de senbrida volupto, tiel ke tiuj ĉi vampirecaj lemuroj uzas sian tute ne malgrandan forton por – el sia regiono – kaŭzi, konservi, kaj ĝis la plej alta grado pligrandigi la suferon de la animaloj kaj homoj, – kaj eĉ tion, kio en la vivo de plantoj respondas al sufero.

Rezulte de la konstanta agnoskado de la sufero kiel supozita „dia“ destinitaĵo, fariĝas iluzia ĉiu rezisto pere de tiuj defendaj fortoj, kiuj – el tio nevidebla fizika de la tera homo – povus kontraŭi la superfortemajn atakojn de tiuj ĉi

nevideblaj turmentantoj, – la povra sencia homo eĉ mem malfermas al ili ĉiun vojon al la plimultigo de la sufero en sia vivregiono, dum animalo per instinkta repuŝo de tio, kio kaŭzas al ĝi sentojn de malemo, almenaŭ provas eviti minacantan doloron ...

Estas vere necese senvalorigi la suferon, kaj ĉiu kontribuu al tio, tuj kiam li mem ekkonis en si, kion la ŝanĝado de liaj imagoj postulita de li signifas por li kaj liaj kunhomoj.

Ankaŭ vi estas vokita por doni tian kunhelpon!

La lumo de la eterneco lumigu vin!

## Dudekoka letero

Kvankam – sciante pri tio *reala* – mi ĝis nun uzas la vorton „benodeziro“ sufiĉe ofte, mi tamen devas konfirmi al vi, ke via sentado gvidis vin ĝuste, se ĝi igis vin ekkoni, ke vera *beno* devas esti io „*multe pli konkreta*“ ol bonintenca *deziro*. La konvencie uzita vorto „benodeziro“ estis kaj estas do ĉiam uzata de mi nur kiel esprimo por la *reala* okazado, pri kiu *devas* temi, se la parolo estu pri aŭtentika kaj rajte nomita *beno*, kaj tute ne nur en ĝia ĝenerala senco, laŭ kiu oni *deziras*, ke beno fluu al la alparolita persono. Kiu vere *kapablas* beni, – kiel estas eble al mi surtere el mia plej interna esto, – tiu devas memori

tiun kapablon eĉ tiam, se konvencia vorto de deziro estas ĝuste tre bonvena al li, por prefere ekstere *kaŝi* la internan altan solenecon, en kiu vera beno sole *povas* esti donata. En la okcidenta mondo la kaŭzo por tio pleje estas la nescio de la benato pri la *ebleco* de la kapablo donaci *spiritan substancan* benon. – Sed ankaŭ aliaj kaŭzoj meritis mian konsideron, pro kiuj mi pleje diris eksplicite nur en apartaj okazoj, ke la procezo de benado el eterna substanca spirita lumo estas *plenumita*. Komprenoble, neniam povus frazo, kiu iel temas pri benado, fariĝi al mi stereotipaĵo. Por tio mi tro konscias pri la „natur“ de la eterna *substanco* de la beno konfidita al mi kaj pri ĝiaj efektoj. Se vi do trovas vorton pri *beno* je la fino de ĉiu el miaj leteroj, vi povas esti vere konvinkita, ke la procezo de benado en la eterna spirito estis *ĉiufoje plenumata* por la rajtigita ricevanto de la letero, kaj ke tiu ĉi beno *denove* fluas al li ĉe ĉiu nova legado, eĉ se tiu relegado – kiu ja devas esti viva enprenado de miaj vortoj en la propran plejinternon – okazus post jardekoj. Krome, ĉar mi benis kaj benas vin ne pro motivo baziĝanta *sur via personeco*, sed, ĉiam lige kun miaj vortoj, *kiel la alparolatan personon, kiu enprenas en sin tiujn vortojn*, la beno farita estas donacita samtempe *al ĉiu aliulo*, kiun vi eble lasos partopreni en la legado de miaj leteroj, kondiĉe ke tiu aliulo montriĝas tiel disvolviĝinta, ke li povas *ricevi* benon... Mi tie ĉi parolas nur pri sobre konsiderendaj sekaj faktoj, por ke vi estu informita pri la naturo de tiu ĉi ripetiĝanta beno, kiom tio estas ebla.

*Vera* beno, kiel mi jam diris, *estas spirita substanco*, de kiu eliras forto, kies grado de efikeco konformas plej akurate al la interna sinteno de la persono benata.

Do, beno estas nek preĝo, nek deziro, nek ligita al iu *gesto* de la benanto, kaj ne dependas de iu parolata aŭ nur pensata *vorto*, sed estas voldestinita eterna spirita substanco direktita en tempan efikadon fare de spirita homo vivanta en surtera korpo. Tiu ĉi unuiĝo kun terhomanimala korpo estas *absolute necesa*, se beno efektiviĝu *en tio ekstera tera* de tiu benota.

Mi vidas per spirita „okulo“ la benon, kiun mi donas, kiel helan, blanke radiantan luman fenomenon, kiu en la tera sfero estas komparebla nur al la lumado de l' *radiumo*, perceptebla sub mikroskopo en malheligita ĉambro; sed ĝia lumado estas nekompareble pli *forta* kaj nur ĝia karaktero memorigas min pri la lumado de la tera elemento. La radianta heleco de la spirita benosubstanco estas tiom intensa, ke mi, pro la kutimo protekti la okulon kontraŭ tro fortan lumimpreson, ofte por momento nevole fermas la palpebrojn, kvankam ja nur la *spirita* „okulo“ tie ĉi perceptas, estante adaptita al ĉiuj gradoj de spirita lumo. –

Benado estas por tiu, al kiu ĝi estas *ebla*, serio da *voloagoj*, per kiuj la beno-substanco, kiu *spiritsence* aperas kiel unue ankoraŭ „neformita“, neregula lumanta fenomeno, ŝanĝiĝas en la spiritajn formojn necesajn por la donota beno, por tiam, laŭ ĝia destino, efiki *plej proksime* aŭ *trans landojn kaj marojn*. Ankaŭ ripetita efiko povas esti aranĝata per voloago.

En viaj leteroj al mi vi plurfoje aparte emfazis, ke vi sentas la ricevon de mia beno „*korpe*“ en maniero eliminanta ĉian memtrompon. Mi intence ne komentis tiujn raportojn, ĉar mi antaŭvidis – sen ia profetado –, ke iun tagon pli detala priparolado fariĝos necesa. Sed via sentado tute ne trompis vin. Vi fakte *ricevis* en mia beno, akceptita de vi, „ion korpan“, – kvankam ion *spiritsubstance* korpan –, kio estas terkorpe sentebla kaj rezultigas terkorpajn plifortigon kaj pliriĉigon. Tie ĉi estu tuj aldonate, ke vi povas ankaŭ *rifuzi* veran benon. Per konscia volo, aŭ nevole nur per via interna memteno! Ĝi tiam revenas, kvazaŭ ĝi estus reĵetita de granita muro, al la sendinto.

En la spirito, la lumanta substanco de la beno estas por mi, laŭ ĝia konsisto, samtempe tiom palpeble „korpa“, kiel en la tera ekstera vivo la muldsablo de fandistoj, kaj same formebla. Ekde la tempo, kiam mi *kapabliĝis* beni, mi neniam benis sen samamaniere spirite „korpe“ percepti je la benito la efikon de l’ beno, se la beno estis *akceptita*.

Vi vidas, ke tie ĉi vere temas pri io alia ol pri tio, kion oni ĝenerale *nomas* „beno“ tie, kie, – surbaze de kredata oficiala aŭtoritato kaj uzante fiksjajn vortformulojn kaj lernitajn gestojn, – oni prezentas ceremonion, kiu plejfavoraokaze povas ricevi ioman realan valoron, se la prezentanto kapablas stimuli almenaŭ similajn *pensofortojn* per ardakora volado favore al la persono laŭsupoze *benita* de li, kiel ĉiu homo ĝis certa grado tion kapablas. Tie ĉi la „beno de la gepatroj“ estas la plej konata ekzemplo.

Sed por povi *doni* veran benon originantan el la vivanta spirita lumo, oni *mem* devas *esti* en tiu eterna lumo, kaj *posedi* benon. Sed iu havanta en si veran benon originantan el eterna lumo ne devas beni *sin mem*. Tamen li rezulte ne sentos mankon, ĉar li staras seninterrompe en la beno de *aliuloj*, kiuj kapablas beni.

Vi, kiu nun certagrade scias per miaj vortoj pri tio, kio okazas, estu hodiaŭ en plej solena maniero benata el mia beno!

## Dudeknaŭa letero

Viaj lastaj karaj leteroj jam estis al mi klaraj unuaj signoj de via iomete post iomete kreskanta, sed tute certe ĉiam pli granda akceptemo por spiritaj perceptoj, – eĉ tie, kie vi devis ankoraŭ lukti kun tio via tereca aŭ opiniis, ke vi ankoraŭ ne povis tute certe fidi vin mem. Sed via nova raporto alportis al mi certecon, kiun mi tamen ne estus kuraĝinta atendi jam tiuĉitempe. Sed nun mi ne plu povas dubi, ke via spirita okulo malfermiĝis, kaj ke vi staras en la unua klare konscia spertado de tio via eterna. Sed tute ne estas mirige, ke vi, ĉe ĉiu via feliĉo, ankaŭ konsciiĝas pri la nekapableco *esprimi* tion spertitan per la *lingvo*, tiel ke vi rigardas ĉion, kion vi raportas al mi, nur „kiel tute neadekvatan balbutadon“. Tio aplikiĝas al ĉiu, kiu unuafoje spertis en si la samon kiel vi, kaj tiu nekapablo prezenti ion eternan en vortoj pleje devas resti neŝanĝita.

En la regiono de *teraj* aferoj ni povas komprenigi ion al aliuloj nur per tio, ke ni tion, kion ni volas lingve prezenti, *komparas* kun io jam prezentita. Tia eblo kompari sur la sama kampo mankas al ni, kiam ni volas priskribi *ion eternan*, kaj tamen nia spertado instigas nin *envortigi* ĝin, eĉ se ni volas lingve registri tion spertitan *nur por ni mem*, kaj nur en nia memoro. En tiu mizera stato ni sekve tamen ekprenas ion terecan, kio malgraŭ ĉiu neadekvateco devas servi al ni, kiom estas eble. Kaj estas eble nur tiam, se ĝuste tiu neadekvateco estas konscie kaj vole *ignorata*: – se oni intence *pretervidas* la nekompareblaĵojn de la spertoj uzitaj en la komparo.

Ĉiu spertado de tio eterna estas daŭra sondado de la profundeco de la eterna *momento*, kiu estas ne sinsekvo, ne io antaŭa aŭ io posta, sed io „*estanta unu en la alia*“, io interpenetranta, kio estas donita en *spirita* „spaco“ kaj estas tute neprezentebla per teraj rimedoj, kio ne fariĝas „eterna“ sekve de nemezurebla sinsekvado, sed *en si*, senkomenca – senfina, „restas“ senfineco. Kiu ne kapablas sperti en si ĉiusekunde la tutan, senfinan eternecon, en sia memlimigo similan al la cirklo, al tiu oni ne povas priskribi ĝin, ĉar ĉiu priskribo okazas en la tera *tempo* kaj estas komprenata nur kiel io tempa. Tiumaniere, „eterneco“ fariĝis al tiuj, kiuj neniam estis en la eterneco, la imago de senfine longa *tempo*, kaj fine ankaŭ ĉiu, kiu vere rajtas paroli pri transtempaj aferoj, venas en la neeviteblan situacion, ke li devas nomi *tiun ĉi tempan imagon* per la sama vorto, kaj kelkfoje por la imagado eĉ kvazaŭ „disdividi“ tion senfinan, tiel ke la unu, kompreneble nedividebla eterneco

fariĝas eĉ „eternoj“, – eonoj, – kiel bilda esprimo de nemezureble longa spaco da *tempo*. Kaj al ĉiu, kiu ankoraŭ ne spertas ion eternan en si mem, fariĝas nedireble malfacile, rezigni en si la eraran imagon, kvazaŭ eterneco estas konstanta estanteco de la tuta *tempo* kaj ke ĝi simple konsistigas „la plenecon de ĉiuj tempoj“.

Nun vi mem vidas, kiel tio eterna evitas proksimiĝon al ĉiuj komparoj donitaj en la tempo, ĉar ĝi estas *io esence alia* kaj alirebla nur al la *eterna* perceptmaniero, al kiu miaj libroj nerimarkeble kondukis vin. Sed kiom da „skizado“ de ĉiuj flankoj estis necesa, por iom post iom vekti en vi la sentokapablon por *spirita* spaco! – Malproksime de ĉia komparo je valoro, miaj traktatoj pri spiritaj aferoj ĉiam memorigas min pri certaj desegnaĵoj de Rembrandt, en kiuj la celita prezentaĵo formiĝas el nenombreblaj strekoj, kiuj provas alproksimiĝi pli kaj pli klare al la imago. Sed *ne nur al mi* estas aliamaniere neeble alporti aferojn de la eterno por aliuloj en la regionon de antaŭsentobleco, sed al *ĉiu*, kiu konas la eternan realon! Sed al tiuj konantaj ĝin jam sufiĉas la plej etaj aludoj por kompreni sin reciproke kaj por scii, kio estas celita. Sed vi desegnis por mi *multe pli* ol nur „aludojn“, kaj estas pli necese por mi averti vin, ke vi ne volu fari vian raporton *tro* eksplicita, ol ke mi povus senti la foreston de io en via prezentaĵo...

Restu en la lumo kaj estu ĉiu-tempe benita!

## Trideka letero

Mi ne „postulas“! – Mi *alportas!* Kaj ĉiu povas *elekti* el tio de mi alportita tion, kio instigas lian volon. Kion vi nomas miaj „postuloj“, al kies plenumado vi tiom ĝoje ŝuldas vian povon spirite sperti, estas nur montritaj de mi necesajoj rezultantaj el la strukturo de la vivo en la eterna spirito. Ekzemple estas nepra *neceso*, kaj tute malproksime de ĉiu eĉ nur ŝajna arbitro de ia „postulo“, ke vi povas fariĝi naskiĝujo por Dio nur tiam, – ke via vivanta Dio povas „naski“ sin en vi nur tiam, se vi estos alveninta al la stato, en kiu vi volas signifi plu *nenion el vi mem*. Ĉia koncesio, kiun vi opinias povi ankoraŭ doni al *vi mem*, barikadas la pordon de la animo per palisaroj! *Absolute nenion* vi volu firmiteni en via memkonscio kiel ion apartenantan *al vi!* Dio ne loĝas iuloke kiel luanto. – Li eniras nur en *ion propran!* – Vi do devas lasi al via Dio kiel lian proprajon *ĉion*, kion vi ĝis nun ankoraŭ opiniis povi rezervi al *vi mem*. Eĉ vian *konscion* vi devas doni al *Dio*, se vi fariĝu *konscia* pri Li!

Tie ĉi en neniun rilato kaj de neniun instanco estas io ajn „postulata“, sed estas nur montrate, kiel la aferoj stas, por ke oni ne esperu ion neblan kaj tiam rekoltu desaponton. Ankaŭ en la tera sfero vi tenas vin, se vi volas sukcesi en via farado, ekzakte je la ekzistantaj kondiĉoj, sub kiuj certa procezo estas ebla. Tie ĉi vi scias pri tiuj kondiĉoj per via sperto kaj la sperto, ĉiam konfirmita, de multaj aliaj. Sed en la eterna sfero vi povas akiri sperton nur tiam, kiam vi *atingis* tion, kion vi volas atingi, kaj tial oni devas montri

al vi el la eterna sfero, kio estas *necesa*, por ke vi *akiru* la sperton sopiratan de vi. Vi ja nun estas sur la ĝusta vojo tiucela.

Tre bela estas via priskribo de la nun atingita certeco pri eterna spertado, certeco kiu donis al vi la definitivajn konfirmon pri tio, ke simple ne *povas* ekzisti ebleco percepti per teraj sensoj la animon de mortinto, ĉar, kiel vi jam nun ekkonas, ĉiuj vivo-*manifestiĝoj* de mortintoj estas *ekstere* de la spertoregionoj de la terkorpaj sensoj. Sed ankaŭ via konsciiĝo, akiranta siajn unuajn spertojn, en tio eterna estas multe malproksima de ĉio, kion la animo komuna al la homo kaj animalo kaj kion la korpaj sensoj povas sperti. Ĝuste tial mi devas reveni al la milda averto je la fino de mia lasta letero, kaj peti vin, laŭeble moderigi vian deziron inkludi tion spirite spertitan en *terecajn* seriojn da spertoj, por pliklarigi la komunikon. Kion vi celas diri, mi scios ankaŭ tiam, se vi donas al mi nur la plej necesajn *aludojn*. Spertado en tio eterna *ne povas* esti „tradukata“ en homan lingvon, sufiĉantan nur por la surtera, *tempa* spertado, eĉ se oni volus aldoni al terhoma lingvo milojn kaj milojn da novaj vortoj kaj nocioj. Niaj teraj lingvoj estiĝis *en la tempo*, por nomi *ion tempa*, kaj tute ne povas adaptiĝi al la plene malsama maniero, en kiu *io eterna* venas en la konscion. Sed la plurripeta obstina provo „eble tamen“ ebligi tion neeban, povas kaŭzi paralizon de viaj spiritaj perceptoorganoj, antaŭ ol ili estas sufiĉe disvolviĝintaj por ebligi al vi ekkoni la danĝerecon de via dezirego al terca pliklarigado. Kiom ajn komprenebla estas via deziro esprimi tion, kio nun forte atingas vian konscion, en vortoj de la cerbokondiĉita

lingvo, tiu deziro povos montriĝi fatala por vi. Sed mi certe volas vidi vin gardita kontraŭ tio, kio tie ĉi minacas.

Plie, ne havu en vi interparoladojn kun vi mem, opiniante, ke vi parolas kun *Dio*! Dio „parolas“ kun vi nur tiam, se vi kapablas resti en vi absolute *kvieta*. Dio „aŭdas“ nur tion, kion *via kvieteco* diras al li. – Kaj Dio *neniam* „parolas“ al vi en vortoj de iu tera lingvo!

Ricevu ĉian benon, kian vi bezonas, kaj iru ĝoje kaj sekure, sed tamen zorgeme kaj memgarde, la vojon malfermitan al vi de antaŭ tiom mallonga tempo!

Dio *povas* „*doni*“ nur tiom,  
kiom li „*prenas*“,  
Ĉar la mezuro de ĉiu dono  
determiniĝas al li  
Per *tio*, kion la ricevanto  
ĝoje *donas*,  
Kiu *amas* la donon de *sia Dio*  
*pli ol ĉiun* havaĵon!

## Epilogo

Mi strikte malpermesas al mi  
Juĝi ĉi tie pri aferoj,  
Kiuj sur tiu ĉi tero  
ne staras sub mia rajto juĝi.

Sed al ĉiuj gravuloj,  
kiel al ĉiuj etuloj,  
Mi scias certa la peson,  
kiun ili ne eskapos ...

Ĉiu iam devos,  
sur *senindulga* pesilo,  
Prezenti *sin mem* al ĉiuj  
je *sia* memjuĝo-tago!

Certe estus eble, aldoni al tiuj ĉi leteroj multajn pliajn, kaj iun tagon mi povus eĉ sekvigi tiun ĉi ciklon per dua. Sed por la komenco estas donita *sufiĉo!* Se tio ekzistanta en sia nuna formo povas vekti en la leganto, elektita por tio, la deziron ricevi por sia propra progresigo pli da materialo tiumaniere formita, la tasko de tiu ĉi libro estas pli bone plenumita, ol se mi estus pligrandiginta ĝian enhavon tiom, ke superrigardo super la tuto estus neeviteble malfaciligita. La tre malgranda libreto „*Koncerne min mem*“ multfoje plej klare pruvis, ke la klarigo povanta eliri de vortoj ne dependas de la ampleksa paĝaro de publikaĵo, sed de la ebleco interne per unu rigardo ĉirkaŭpreni la enhavon.

Mi intence lasis nemenciita en la leteraj ĉapitroj de tiu ĉi libro la lingvan memprezentadon, kondiĉitan sole per mia eterna esto, en la tri silaboj „Bô Yin Râ“, kiuj por multaj homoj irantaj preter miaj instruaj libroj ankoraŭ estas „pseŭdonimo“ kaj restas objekto de persista misinterpretado... Por la *vica ordo* de la leteroj mi elektis, kiel gvidilon, disvolviĝadon konatan al mi kun ĉiuj ĝiaj interludoj el multaj unuopaj okazoj, sed en kiuj la serĉanto,

longe antaŭ ol direkti al mi la unuan vorton, estis liberiĝinta el la konvenciaj katenoj, kiuj firmitenas aliajn homojn je tro malaltaj vidpunktoj, de kiuj oni povas ricevi nur la groteske distorditajn bildojn de la „ranoperspektivo“. Mi tial tute ne povis reprodukti iun el la malmultaj leteroj, kiujn mi estis devigita skribi antaŭ multaj jaroj pri la tri silaboj ekvivalentaj al mi, kaj iliaj „portantaj“ literoj. Sed estus apenaŭ respondebla neglekto, se tio intence nefarita ene de la libro ne estus tamen farita je ĝia fino. Aliaflanke, ne ekzistas kaŭzo por reteni la *leteran formon* por tio nun direnda, kvankam povas esti preparolata nenio alia ol en la supre menciitaj maloftaj leteroj.

Ree kaj ree mi devas rimarki, ke, koncerne la silaban formulon kiu konformas al mia eterna esto, oni konfuzas *tion nekutiman* de litera bildo kaj ties prononcon kun la nocio de „fremdlandeco“.

Sed la laŭsupoze „*hinda*“ nomo, kiun oni laŭkrede tie ĉi renkontas, estus – se la tri silaboj tion celus – neniel konforma al *hinda* sistemo de nomoformado. Same malmulte temas tie ĉi pri io *ĉina*. Mi petas hindologojn kaj orientalistojn bonvole pardoni al mi, ke mi eĉ nur mencias tian evidentaĵon. Sed tio bedaŭrinde estas *necesa!*

Se mi estus volinta krei al mi „pseŭdonimon“, nur frenezo estintus kapabla derivi ĝin el lingvaj regionoj, kiuj ne havas la plej malgrandan rilaton al mia deveno de frankoniaj vitkultivistoj, forstistoj kaj kamparaj majstroj-metiistoj, kaj al miaj eksteraj vivovojoj, neniam vualitaj.

Sed se aventura, ekscentra strangulo, por siaj proksimuloj malaperinta dum jaroj en aziaj landoj, povus eble trovi romantika la ideon kaŝi sin malantaŭ ekzota pseŭdonimo, li devus esti fariĝinta tre vivofremda, se li povus kredi, ke hodiaŭ prudentaj homoj en Eŭropo ankoraŭ prenas lian maskiĝon serioze. Ĉio, kion mi iam skribis, direktiĝas sole nur al homoj, al kiuj eŭropano, kiu kaŝas sin malantaŭ azia pseŭdonimo, estas tolerebla plejfavoraokaze nur en lokoj de amuzaj distraĵoj: ĉe spertuloj de strangaj artoj aŭ korpaj forteco kaj aŭdaco. Tia sinteno kompreneble aplikiĝas ankaŭ al mi, kaj mi kapablas konkludi de mi al aliuloj. Plie, mi publikigis en la nomo de la silaba formulo ekvivalenta al tio mia eterna – aŭ ĝiaj „portantaj“ literoj – eĉ ne unu linion, sen scii ke tre konsiderinda nombro de personoj al mi proksimaj estis informita pri tio spirite donita, kio surmetis sur min la devon, ne atribui al mia civitana familia nomo tion, je kio ĝi ne havas rajton. Sed ne ekzistis la plej malgranda *kaŭzo*, kiu povintus igi min uzi „*pseŭdonimon*“, kaj krome mi ricevis, sekve de diversaj okazoj en mia vivo, longe antaŭ ol mi mem havis por publikigi librojn, pli ol sufiĉan enrigardon en la praktikon de eldonista kaj redakcia juĝoformado, ol ke mi povus – eĉ se „pseŭdonimo“ fakte estus ŝajninta al mi necesa – doni min al al la plej milda trompiĝo pri tio, ke nenio povus esti pli malĝusta ol derivi ĝin *de aziaj lingvoj*.

Ĉiuj juĝokapablaj homoj en la mondo prave rifuzas akcepti iun malsaĝan maskiĝon, kiun nur homo mizere neprudenta povus rigardi kiel atentigilon al li kaj liaj aferoj.

Jam antaŭ kelka tempo mi laŭsence diris pri la tri silaboj “Bô Yin Râ”, en eldoneja broŝureto, ke ne temas pri tri “vortoj”, el kies signifo oni povus eltiri ian sekretan sencon, kvankam kiel silaboj ili respondas al radikoj en antikvaj lingvoj, – sed ke tiuj ĉi sep literoj formas mian “nomon” *ekvivalentan* al mia substanca-praspirita esto, tial ke iliaj sonaj kaj signaj valoroj konformas al *mia eterna spirita esenco*, same kiel en muziko certa *grupo da notoj*, signeblaj per literoj, konformas al certa *akordo*. (La “Y” en “Yin” estu elparolata kiel “Ü”, proksimume kiel la “W” en “Win”<sup>\*</sup> en la malnova altgermana lingvo, kaj *ne* povas anstataŭata per “J”. La cirkumfleksoj super “o” kaj “a” signas prononcon longan.)

Kvankam mi *en tio mia eterna* ĉiam estis *konscia* en tio, kion la formulo de la tri silaboj Bô Yin Râ *celas*, mi tamen devis esti konsciigata pri tio en la fluo de la tempo *ankaŭ en mia cerba konscio*. Pri tio temis en la indikita loko kelke da teksto, en kiu mi diris, kiel miaj spiritaj gvidantoj instruis al mi tute aliajn nociojn pri la naturo de vera „nomo“, ol estas ĝenerale troveblaj tie ĉi surtere. Mi koncize raportis, ke mia anima edukado gvidis min al la konscio pri misteraj vojoj, kiuj kondukas de *unu* „nomo“ al *nova* „nomo“; certaj literoj de tiuj ĉi nomoj efikas kiel spiritaj „antenoj“, per kiuj ĉiam nova spirita helpo estas sendata al tiu nevideble gvidata. Mi krome diris, ke dum mia spirite gvidata instruado mi mem portis kelkajn el tiaj „nomoj“, kiujn mi devis lerni *superi* en ĉiam nova memsuperado, antaŭ ol mi povis fariĝi vere inda je mia

---

\* „ÿin“ en Esperanta transskribo (rim. de la tradukinto)

praeterna nomo ankaŭ en mia pasema *tera* korpo, kiom la ekstera natura disvolviĝo iom post iom permesis tion.

Sufiĉe longe mi jam estis paŝinta sur la vojo de „nomoj“, antaŭdeznita al mi, kaj vere sciis proprasperte pri la *fortovekanta* naturo de spirite formitaj nomoj, sed ŝajnis al mi neeble, krei al mia *praeterna* nomo, pri kies *substanco* mi jam de antaŭ jaroj estis konscia *ankaŭ terece, ekvivalenton en sonoj kaj literoj*, ĝis mia spirita edukanto, meze de aliaj unuiĝintaj kun li kaj mi, malfermis al mi, en benita nokto ĉe greka maro, okulojn kaj orelojn por tio, kiel tio estas ebla, eĉ *necesa* ... Ekde tiam mi havis ankaŭ la teran *sonformulon* kaj ĝiajn *signojn* por tio, kio *substance* estas mia „nomo“ en tio eterna: – *fortoformo* destinita de la Patro spirite en eterna generado, kaj *volo* movanta tiun formon eterne laŭ unufoje ekigita impulso el la Patro.

Tio estas la *vera* sekreto pri la laŭdire „hinda“ nomo, en kiu oni opinias ekkoni el kutima propra perspektivo „fremdlandan“ *pseŭdonimon*.

Sed ĉar nenio en la eterna esto, kaj sekve ankaŭ nenio en la *tera* ekzisto kuŝas izolite en si mem, tial ankaŭ tio, kio mi *estas* en mia eterna nomo, al kiu la formulo Bô Yin Râ kreas nur *teran* esprimon, estas en intima kaj malproksima ligiteco kun senfina multo. Pro tio, kelkaj interpretoj, kiujn oni donas al tiu *tera*-sense kaptebla formulo, – pro asocioj ĉu lingvaj kaj sonaj, ĉu originantaj el la literaj signoj, – enhavas pli multajn aferojn *konformajn al la realo*, ol povas suspekti la respektivaj „malkovrintoj“ kaj la „interpretantoj“ kun iliaj plej strangaj komparoj.

Ke por mi estas kontraŭe al la bona gusto, eĉ mem stimuli, per propraj atentigoj, analizojn eblajn surbaze de certaj asocioj, – kiel oni sufiĉe ofte postulis de mi, – oni ankoraŭ devos lerni kompreni. Al neniu, kiu konsultas miajn instrulibrojn, fariĝus lia vojo pli facile irebla, se li sciis plej detale, kiuj landoj de praantikva religia kulturo jam estis, dum la tempo de mia preparado por mia surtera agado, mia kaŝa anima-spirita hejmo. Same malmulte utilis al serĉanto, se li estus malkovrinta ĉiujn sekretajn signifojn – al mi mem tute indiferentajn – de la literoj en la tri silaboj, kaj iliajn en Oriento tradiciajn nombrovalorojn. Oni ne devas atendi de mi eksplikojn pri aferoj, al kiuj mi mem konsciavole rifuzas doni apartan atenton en mia propra vivosfero, ĉar en la tempo donita al mi, ene de la mondo kiu estas mia agada sfero, ili estas sen ia estanteca signifo.

Kiu ne povas sin deteni sekvi ĉiujn spurojn, kiuj krucas lian padon al la lumo sur *ĉiuj* niveloj de ia direkto, tiu apenaŭ en tiu ĉi tera vivo alvenos tien, kien trankvila plupaŝado povus alvenigi lin. Eĉ la plej nobla scivolemo fariĝas *delogo*, se ĝi volas detiri de la propra vojo, kaj mi tute ne povas favori tion, kion mi ekkonas kiel *malhelpon* al la serĉanto. Ekzistas vere sufiĉe da taskoj, kiuj estas pli proksimaj al mi ol la kontentigo de cerbumanta sciavido!

Mi do finas hodiaŭ tiun ĉi libron tiel, kiel mi skribis ĝin: – *benante el la eterna lumo ĝiajn legantojn, kiujn mi elektis kaj destinis al ĝi*, – en mia eterna nomo

*Bô Yin Râ.*

Tradukoj de pliaj libroj  
el la spirita verkaro de Bô Yin Râ  
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:  
<http://www.a-rehfeldt.de>